

人民中國報道

El Populo Cínico

Jun. 1952

6



Protektu la Infanojn

Sung Ĉing-ling

Deklaro de Sung Ĉing-ling, prezidanto de Ĉina Popola Landa Komitato por la Defendo de Infanoj, okaze de la Konferenco por defendo de infanoj kunvenanta en Vieno, inaŭgurita je la 12a de aprilo.

Protektu la infanojn! Protektu ilin for de ĉia ebla damaĝo! Donu al ili ĉian avantaĝon en vivo!

Ĉi tiuj estas la postuloj de ĉiu ajn deca persono. Ĉar nenio estas pli kara al homo ol liaj infanoj.

Sed hodiaŭ, la infanoj estas sub rekta minaco. Jam estas milito kiu detruadas en pluraj anguloj de la mondo. Jam estas patrinoj starantaj en la mezo de disĉiritaj kampoj kaj ruinigitaj stratoj, versante dolorajn larmojn pro siaj junaj idoj. Tio estas instruoplena al la homaro. Ĝi estas averto ke ni devas nun agi por malhelpi ĉi tian mizeron kaj suferon ataki ĉiujn infanojn. Ni povas vidi ke protekti la infanojn estas la unua kaj plej grava problemo de paco.

La ordinaraĵoj viroj kaj virinoj sur la tero volas super ĉio alia unu aferon. Ili volas elvivi sian vivon, kreskigi siajn idojn kaj labori en paco. Ili unuanime subtenas la ideon ke la homaro estu ŝparitaj la teruro, la vundoj, la dezertiĝo kaj la kripligo de infanoj kio jam du foje markis ĉi tiun jarcenton. Ili eble diferencas en religio; ili eble diferencas koncerne politikajn problemojn; ili eble estas laboristoj, verkistoj, mekanikistoj, aŭ kamparanoj; sed pri unu afero ili ĉiuj insistas komune—ke ni devas klopodi per ĉiuj fortoj malhelpi militon, por protekti la infanojn.

La solvo komenciĝas kun la leviĝo de la patrino en ĉiu hejmo por kontraŭbatali militon. Ilia potenco pli kaj pli fortiĝas, se ĉiu patrino rimarkas ke en la najbareco, en la distrikto, en la vilaĝoj kaj urboj kaj tra la tuta lando, troviĝas aliaj patrinoj kiuj sentas egale forte pri ĉi tiu problemo. Ĝi atingas kresĉendon de forteco kiam patrinoj tra la tuta mondo agas unuigitaj, ne nur por malhelpi militon, sed ankaŭ por ĉesigi pormilitajn preparojn. Tia unueco de agado estas tute ebla. Ni vivas en epoko de disvolviĝanta scienco, kiam milito influas ĉiujn kaj ĉie kaj la deziro eviti tian katastrofon estas universala.

Certe troviĝos homoj kiuj kuraĝos kontraŭstari kaj eĉ provos malhelpi ĉi tiun neestingeblan sopiron por protekti la infanojn. Ili provos ĉian manieron kaj rimedon de trompo. Sed ĉiu ago ilia ilin mem perfidos. Ĉar niaj postuloj estas simplaj kaj logikaj. Oni estas aŭ por paco aŭ kontraŭ ĝi. Do estas facile decidi kiu estas amiko kaj kiu malamiko, kun kiu ni devas unuigi kaj kontraŭ kiu ni devas batali.

Ni scias efektive ke homoj nur gratis la surfacon por sin provizi sur ĉi tiu terglobo. La terglobo ne bezonas ke ĝia loĝantaro estu malpliigita. Male, ekzistas aktuala bezono por pli da loĝantaro. Ne estas "sorto" aŭ "neevitebleco" kiu postulas ke niaj infanoj estu mortigitaj en milito. Male ni devas protekti kaj eduki ilin por havi pli da manoj kaj cerboj por pluen disvolvi civilizacion.

Tio estas solidaj faktoj. En Ĉinio, en la pasintaj du jaroj sole, ni jam demonstraciis ilin eksterdube. Multaj antaŭaj "priĉiniaj specialistoj" fariĝis fame konataj nur pro tio ke ili citadis "supernombran loĝantaron" kiel la kaŭzon de la malbonoj de Ĉinio, tiel deturnante atenton for de la peza ŝarĝo de feŭdismo kaj imperiismo de kiuj la ĉina popolo estis subpremata. La "kronika malsufiĉo de nutraĵo" estis ilia plej

ĉatata ilustraĵo. Sed de post la fondiĝo de nia Popola Respubliko, ni jam ŝtopis al ili la buĉon. Ni jam produktis sufiĉan nutraĵon por kontentigi la bezonojn de nia propra popolo kaj dume ankaŭ provizis superfluaĵon por eksporto. Tamen ni estas ankoraŭ malproksimaj de mekanika terkulturado kaj grandaj partoj de nia lando restas kulturotaj. Tial la faktoj pruvas ne nur ke ni povas nutri kaj vesti nian nuntempan loĝantaron, sed ankaŭ ke ni povas industriigi kaj subteni multe pli da popolo.

Ĉu povas troviĝi pli bona demonstracio de la veraj kaŭzoj kaj rimedoj por la "nesolveblaj" problemoj de la tiel nomataj specialistoj? Nia propra sperto, en kiu ni estis anticipitaj de aliuloj kaj kiu valoras por ĉiuj nacioj, montras ke kie iu sistemo povas "funkcii" nur per la ago kondamni popolon al mizero kaj morto, la popolo respondas per la ago kondamni tiun sistemon al morto—kaj ili mem daŭre vivas!

Kie kuŝas la ĉefa minaco al niaj infanoj? Hodiaŭ la ĉefa batalo estas kontraŭ la detrueca intenco de nura plenmano da personoj, kiuj posedas fabrikojn, bankojn, kompaniojn, minejojn, kaj uzinojn kiuj profitas el milito. Ĉi tiu plenmano da personoj ankaŭ posedas la komunikilojn de siaj landoj kiujn ili uzas por siaj mallarĝaj intereso. Ili havas industriajn provizojn kaj grandan nombron da mekanikaj voĉoj por ili proparolantaj. Sed ilia potenco estas pli ŝajna ol reala. Iliaj entreprenoj ne povos funkcii, nek iliaj administracioj superregi, nek iliaj armeoj batali—se la popolo unuigos por sia propra intereso. Ili estas fortaj nur kiam ili povas trompi—kaj la trompado fariĝas pli kaj pli travidebla. Ili ne estas la nerezistebla fluo kiun neniam obstaklo povas kontraŭstari. Male, la popolo estas la giganta rivero, dum ili, la eta obstaklo!

La sopiroj kaj postuloj de la plejmulto ne povas esti neglektata. Ĉi tiuj sopiroj kaj postuloj ne povas efektiviĝi, nur kiam la homoj estas izolaj. La stato aliĝas, kiam ili unuigas. Tio estas kial nia movado batalakiri pacon kaj defendi infanojn fariĝas la plej granda forto en la mondo. Ĉi tiu movado povas senarmigi la militpreparantojn je pafiloj kaj bomboj. Ĉi tiu movado povas apliki atomenergion al la ideala tasko revita de sciencistoj, helpi la homaron altigi sian vivon kaj ne detruu la homaron.

"Unueco estas forto." Ĉiuj scias ĉi tiun malnovan diraĵon kaj ĝi despli aplikiĝas nun. Tiuj kiuj volas batalakiri pacon kaj sekuron por la infanoj devas tion kompreni kaj rigardi kiel gvidilon. Ni devas agi unuece.

Ni transdonas la standardon de vivo al la infanoj, ke ili ĝin alte levu kaj daŭrigu la antaŭeniron sur la vojo de homa progreso. Ni elkore kredas, ke se ni faras komencon por la infanoj, ili konstruos progresajn socion kaj kulturon, ke ĉiuj vivu feliĉe kaj ĝoje, sen malutili al iu ajn alia. Ni elkore esperas ke ni povas doni al ĉiu infano tian ŝancon. Ni estas batalantaj por ĉi tiu tasko kaj kredas ke la popoloj de ĉiuj aliaj landoj nepre batalos kune kun ni. Tio estas kial la ĉina popolo postulas kaj defendas pacon.

Disvolvigo Internacia Komerco

—Parolado pri la perspektivoj de ĉina komerco kun Eŭropaj kaj aliaj landoj farita de Lej Jen-min, ĉina delegito al la Internacia Ekonomia Konferenco en Moskvo, ĉe la unua laborgrupa kunsido.—

Jam de longe en la historio ekzistis komercaj rilatoj inter Ĉinio kaj la Eŭropaj landoj. Kun Holando, Finnlando, Svedio, Norvegio, Danlando, Svisio, precipe kun Anglio, Francio, Italio kaj Germanio Ĉinio havis pli intimajn komercajn rilatojn. Ĉinio estis, estas, kaj povos esti ilia grava merkato por industriaj ekipaĵoj kaj produktaĵoj; sed lasttempe pro artefaritaj barieroj, ĉi-tiaj tradiciaj komercaj rilatoj ege malplimultiĝis.

Pro geografia proksimeco, kun Aziaj landoj Ĉinio havas en historio longdaŭrajn kaj intimajn ekonomiajn rilatojn. Antaŭ la milito, la ĉina-japana komerco, precipe, iam atingis 340 milion dolarojn. Tamen nun ĝi preskaŭ tute ĉesis.

Kun la Amerikaj landoj, precipe kun Usono Ĉinio havis ankaŭ komercajn rilatojn de proksimume cent jaroj. Sed tiaj ĉi rilatoj estis rompitaĵoj de la Usona registaro je la 17a de dec. 1950.

Evidente, la artefaritaj barieroj, kiuj velkigis la internaciajn komercon, estas malutilaj al la popoloj, industriistoj, komercistoj kaj la ekonomia disvolvigo de ĉiuj landoj. Tial ni insistas pri kiel eble pli granda vastigo de internacia komerco surbaze de egaleco, interprofitigo; kaj kontraŭas al la politiko de blokado, embargo aŭ maljusta distingo.

Estis konate, ke Ĉinio estas lando de vasta teritorio, abundaj naturaj provizoj kaj grandega nombro da loĝantaro. En la pasintaj du jaroj, nova Ĉinio en la flanko de restarigo kaj disvolvigo de la nacia ekonomio akiris grandan atingon. La produkto en industrio kaj agrikulturo jam proksimiĝis kaj en kelkaj kampoj jam superis la antaŭmilitan nivelon. Des pli granda disvolvigo estiĝos en 1952. La ebleco disvolvi komercon inter Ĉinio kaj aliaj landoj estas senlima.

Mi volas ĉi tie paroli pri la ebleco de eksporto de Ĉinio.

La sojfabo de Ĉinio, en la mondmerkato okupas tre gravan pozicion. Ĝia kvalito estas supera, kaj la produktokvanto ankoraŭ povos laŭplane plimultiĝi.

En la kampo de tung-oleo Ĉinio estas la plej granda kaj la plej frua produkta kaj eksporta lando tra la tuta mondo. Mi estas certa ke la kvanto de tung-oleo, kiun ni kapablas eksporti, tute povas plenumi la bezonon de la landoj reprezentataj en ĉi tiu konferenco.

La diversaj specoj de vegetaj-oleo kaj semoj de Ĉinio, kiel arakiso, sezamo, faboleo, fabrekremento, arakisoleo k.a. okupas en la mondmerkato gravan pozicion. Ĉinio kapablas sufiĉe vin provizi.

Ĉinio havas grandkvanton da porkaĵo por eksporti. La bonkvalitajn ovojn produktatajn en Ĉinio kiel antaŭe ankaŭ nun ni povas grandkvante liveri por kontentigi la bezonon de la popolo en Eŭropo.

Dum la pasintaj du jaroj teo kaj silko de Ĉinio jam ege pli boniĝis en kvalito. Kaj la produktokvanto estas leviganta al plej alta nivelo en historio. Nuntempe, Sovetunio kaj popoldemokratioj estas la plej grandaj klientoj por teo kaj silko de Ĉinio. Ni volonte tion liveros ankaŭ al la popolo en aliaj landoj same kiel al Sovetunio kaj la popolaj demokratioj.

En 1951 la produktokvanto de tabako de Ĉinio trione superis la plej altan nivelon en historio. Nun Ĉinio ekhavas grandkvante da tabako por eksporti.

Ĉinio povas kontentigi la postulon por porkharedoj. Pri tio mi ne bezonas detale paroli.

Ĉinio havas grandan kvanton da karbo por koaksofarado kaj hejtado, por provizi Japanion kaj aliajn landojn. La prezo de karbo transportita al Japanio de Ĉinio estas pli malkara je ĉirkaŭ 20 Usonaj dolaroj po tuno ol tiu de la alia hemisfero. Se ne pro la artefarita bariero, mi kredas, la karbo de Ĉinio povus helpi al malaltigo de la industria kosto kaj al la bonigo de la vivkondiĉo de la japana popolo.

Antimono, salo, baŭksito (mineralajo de aluminio), mangano, magnezio kaj aliaj mineraloj de Ĉinio, ĉiuj ĉi, mi kredas, estas eksportaĵoj bone konataj de ĉiuj landoj, precipe de Japanio.

La metiartaĵoj kreitaj de la ĉina popolo pro ĝia longdaŭra kulturo, kiel brodaĵoj, brokatoj, skulptaĵoj, klaŭzonoj, silkopunto, lakitaĵoj kaj tapiŝoj, mi kredas, jam de longe ĝuas tre altan reputacion inter la tutmonda popolo. La ĉina popolo volas daŭrigi la provizon de ĉi tiuj artaĵoj al la mondo.

Tio ĉi estas la ebleco de ĉina eksporto. Pro la grandskala ekonomia konstruado en Ĉinio, tia ebleco konstante kreskas. Tio prezentas al ĉiuj landoj en la mondo fortan garantion por longdaŭre aĉeti de Ĉinio tiajn aĵojn, por konstante plivastigi la internaciajn komercon kun Ĉinio.

Same kiel en la eksporto ankaŭ en la importado de Ĉinio kuŝas grandioza kaŝita forto. Rezulte de la agrara reformo kaj ekonomia konstruado, la vivnivelo de la popolanoj altiĝis, sekve aperis grandega aĉetpovo de proksimume 500 milionoj da loĝantoj. En 1951 la aĉetpovo de la ĉina popolo pligrandiĝis je 22% ol tiu de 1950; en 1952 ĝi ankoraŭ pligrandiĝos ol en 1951. Tia grandega aĉetpovo senprecedenca en ĉina historio, vastigis la enlandan merkaton, instigis la disvolvigon de produktado kaj samtempe prezentas al ĉiuj landoj en la mondo fortan garantion pligrandigi eksporton al Ĉinio. La ĉina popolo bezonas disvolvi sian propran industrion, tial ni bezonas diversajn ekipaĵojn de industrio, maŝinojn kaj maŝinpartojn, instrumentojn, metalajn kaj ĥemiajn materialojn. Krom tio, Ĉinio ankaŭ tre interesas en fabrikaĵoj de ĉiutaga uzo kaj iuj industriaj krudmaterialoj. Ni kredas, ke la fabrikistoj kaj eksportistoj, kiuj volas vendi al ni kaŭĉukon, kaŭĉukaĵojn, sukeron, kotonon, ĥemiajn sterkojn, petrolon, paperon, paperpulpon kaj multajn aliajn varojn de ĉiutaga uzo por la popolo trovos en Ĉinio vastegan merkaton.

Tio ĉi estas la ebleco de importado de Ĉinio. Kun la senĉesa disvolvigo de la ekonomia konstruado, kaj la konstanta altiĝo de la popola vivnivelo en Ĉinio, tia ebleco ankoraŭ senlime kreskos.

El tio, oni povas vidi, ke la disvolvigo de internacia komerco estas utila al ĉiuj landoj kaj popoloj, malgraŭ la malsameco de kredo, politikaj kaj sociaj sistemoj. Mi firme kredas, ke per la komuna penado de la popolo en ĉiuj landoj, ĉiuj artefaritaj barieroj en internacia komerco povos esti konkeritaj, kaj normala internacia komerco povos esti disvolvata.

Mallongige trad. Venpino

Majtaga Parado de Fido kaj Forto

La plej kolorriĉa kaj gaja Majtaga parado de Pekino estis manifesto de unueco kaj ĝojo, de fido kaj forto kaj, antaŭ ĉio, de la forta volo de la ĉina popolo defendi pacon. Ĉion ĉi esprimis Urbestro de Pekino, Peng Ĉen, proklamante la komencon de la parado. Li diris:

“Ni estas ĉi tie por celebri Majtagon, tagon de unuigo de la laborantaj popoloj tra la mondo. Ni celebras la grandajn venkojn de la ĉina laboranta popolo sur ĉiuj frontoj dum la pasinta jaro. Ni celebras la grandajn venkojn de la Sovetunio kaj la Popolaj Demokratioj en konstrua laboro kaj en la defendo de paco. Ni celebras la venkon de la laborista movado tra la mondo, la venkon de la liberiga movado de la subpremataj popoloj kaj la grandan venkon de la popoloj tra la mondo en la movado defendi pacon.”

Maro de ruĝaj silk-flagoj komencis sin movi tra la historia placo ĝuste je la deka matene post kiam 28 artileriaj salvoj skuis la aeron kaj la ludado de la Nacia Himno kaj la Internacio malfermis la ceremonion. 750 standard-portantoj tenis la flagojn de la Lando, Partio, kaj Junula Ligo. Ilin sekvis gigantaj portretoj de Maŭ Ze-tung kaj Sun Jat-sen kaj post ili tiuj de Liu Ŝaŭ-ĉi, Ĉoŭ En-laj Ĉu Teh kaj de la kvar grandaj proletaj gvidantoj Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj pli poste tiuj de la popol-gvidantoj de multaj landoj—Kim Il Sung, Ho Ĉi Min, Boleslwa Bierut. Klement Gottwald. Wilhelm Pieck, Gheorghe-Dej, Matyas Rakosi, Vulko Ĉervenkov, Enver Hoxha, Tsedenbal, Kyuiĉi Tokuda, Maurice Thorez, Palmiro Togliatti, William Z. Foster, Harry Pollitt kaj Dolores Iharruri.

Poste venis junaj pioniroj. Dudek miloj da ili faris bildon de belaj koloroj. Kiam ili iris preter la estrado ili elsendis centojn da kolomboj, levis supren bukedojn da floroj kaj librojn kaj hurais al sia amata Prezidanto Maŭ Ze-tung. Paro da geknaboj simbolantaj la grandan estontecon de Ĉinio foriris el la vicoj kaj post kiam ili prezentis florojn al Prezidanto Maŭ ili restadis sur la estrado ĝis la fino de la parado.

Sur la estrado staris Prezidanto Maŭ Ze-tung, Vicprezidantoj Ĉu Teh, Liu Ŝaŭ-ĉi, Li Ki-ŝen, Ĉang Lan, Ĉefministro Ĉoŭ En-laj kaj Vicĉefministroj Tung Pi-vu, Ĉen Jun, Kuo Mo-ĵo, Huang Jen-pej kaj aliaj gvidantoj de la Registaro, Popola Liberiga Armeo, Mara kaj Aera Fortoj, demokrataj partioj kaj grupoj kaj popolaj organizoj.

Sur la teraso por honoraj gastoj estis la sindikatistoj, gastoj de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, inkluzive du el la Monda Federacio de Sindikatoj—A. Kolibanov kaj E. Thornton—kaj reprezentantoj el 18 landoj.

Ĉeestis ankaŭ la registara delegacio de Ĉeĥoslovakio, estrata de V. Kopecky; la Hindia kultura delegacio, estrata de S-ino Pandit; kaj la Birma kultura delegacio, estrata de U Tun Pe.

Krome estis vizitantoj el Francio, Italio kaj Ĉilio kiuj estis ĉi tie pro la datrevena celebros de la kvar internaciaj kulturaj gigantoj kaj delegitoj el 14 landoj kiuj ĉeestis la Internacian Ekonomian Konferencon en Moskvo kaj venis ĉi tien al Ĉinio, inkluzive de Robert Chambeiron; la korea popola delegacio, estrata de Hong

Sun-ĉel kaj reprezentantoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj; kaj la Hungaria Popola Ŝtata Ensemblo, estrata de Szollosi.

Estis laborherooj el diversaj branĉoj de industrio, vizitantoj de naciaj minoritatoj kaj ĉinoj loĝantaj en Birmo, Indonezio kaj Malajo.

Sur la vizitanto-teraso estis ankaŭ la ambasadoroj de Sovetunio, Rumanio, Hindio, la Germana Demokrata Respubliko, Mongolio, Hungario, Bulgario, Birmo, Pakistano, Koreio kaj Ĉeĥoslovakio; la ministro de Svislando, respondeculoj de aferoj dumtempaj de Indonezio, Viet-namo, Danlando, Svedio, Finlando kaj Pollando; kaj intertraktaj delegitoj de Britlando, Nederlando kaj Norvegio.

Specialistoj el Sovetunio kiuj helpas ĉinan konstruadon invitite de ĉina registaro estis ankaŭ sur la teraso por honoraj gastoj.

Miloj da industriaj laboristoj de Pekino paradis sub la slogano “Laboristoj de Ĉiuj Landoj, Unuigu!” En la unuaj vicoj iris la laboristoj de Ĉang-sintien-a Fervoja Fabriko montrante modelon de lokomotiva modelo kaj proklamante la superplenumadon de la celita lokomotiva superŝarĝo je 111.4 procentoj. Ministroj el la minejoj en la ĉirkaŭaĵo de Pekino levis alte pneŭmatikajn borilojn anoncante 70-procentan plialtigon en produktado. Ŝtal-laboristoj de Ŝeĉingŝan-Fabriko fiere elmontris zorge preparitan modelon de sia fabriko kiu eligis fumon el sia fumtubo kaj ili proklamis la trioblan plialtigon de sia fer-produkto dum la unua kvarono de tiu ĉi jaro kompare kun 1951. Post ili estis la konstru-laboristoj, cement-laboristoj kaj pres-laboristoj, komizoj kaj laboristoj el aliaj kampoj, ĉiuj al kiuj kontribuis en laboratingoj kaj al la preparado por la industriigo de Ĉinio.

Inter la plej viglaj vicaroj estis la 60,000 studentoj el kiuj multaj levis ekzemplerojn de la nove eldonita volumo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Precipe la knabinoj prezentis brilan, kolorriĉan spektaklon pro siaj belaj vestoj. Ili sekvis milojn da atletoj kiuj venis speciale al la ĉefurbo el ĉiuj partoj de la lando kaj kiuj aspektis sanaj kaj bronzaĵaj kaj portis la emblemon: “Por Laboro kaj Defendo.”

La grandaj kolonoj de terkulturistoj inkluzivis tiujn kiuj starigis rimarkindajn rekordojn. Ili problemis ke en la vilaĝoj de la Pekinaj distriktoj 2,432 interhelppaj teamoj estas organizitaj kaj la printempa semado estas finita.

Estis ĝenerale rimarkeble ke precipe la knabinoj kaj virinoj estis multe pli bele kaj elegante vestitaj ol dum la lasta jaro. Ĉirkaŭ kvarono de miliono da Pekinaj loĝantoj pretermarŝis post la ĉefaj kolonoj. Ili inkluzivis dommastrinojn kiuj aktivis en la sociaj laboroj de siaj stratoj kaj helpas pliperfektigi lokan socian vivon. Ili havas plenan kaŭzon por celebri ĉar la vivnivelo plialtiĝis meznombro 20 ĝis 30 procentojn depost lasta Majtago.

Inter ili estas ankaŭ miloj da butikistoj kaj komercistoj, reprezentantoj de la budaismaj, kristanaj, mohametanaj kaj aliaj religiaj rondoj.

Grupo da verkistoj, dramistoj kaj artistoj estis gvidata de la bone konataj Laŭ Ŝe, Li Po-ĉaŭ kaj Caŭ Ju.

Interspace de la trupoj de paradantoj marŝis bandoj ludantaj tiujn viglajn kantojn popularajn tra la tuta lando—"Kanto pri la Patrio", "Ni Laboristoj Estas Fortaj" kaj "Komuna Volo de 1' Homa Rond".

La Placo de Tien-an-pordego prenis sur sin freŝan aspekton kun belaj historiaj arkoj kaj muroj nove pentritaj. Gigantaj ĉinaj ideografoj formis sloganojn konvenajn por la tago—"Vivu Prezidanto Maŭ", "Vivu Stalin", "Vivu la Komunista Partio" kaj "Vivu Marksismo-Leninismo."

Rimarkindaj ĝojo kaj fido regis tra la tuta parado pliintensigite de la kolorriĉaj kostumoj de la naciaj minoritatoj kaj de la grandaj dekoraciaj kolonoj de danc- kaj kant-grupoj. Jango-tambur-dancantojn sekvis elegantaj koreaj dancantoj kaj poste la Hungaria Popola Ŝtata Ensemblo kiu jam akiris grandan popularecon en Ĉinio. Ili haltis antaŭ la estrado kaj aplaŭdate de ĉiuj rigardantoj prezentis spiritplene siajn naciajn dancojn kaj poste kantis "Oriente Ruĝas Sun" ĉinlingve. Ses membroj el la Hungaria Ensemblo tiam

supreniris la estradon kaj oferis standardon de sia registaro kaj popolo al Prezidanto Maŭ.

Kiam la parado finiĝos, en la brila sunlumo de Pekino miloj da registaraj laborantoj kun junaj pioniroj en frontaj vicoj kiuj staris en la placo, venis amase antaŭen portante siajn standardojn kaj ruĝajn flagojn, huraante siajn salutojn al Prezidanto Maŭ.

Estiĝis granda entuziasmo kiam, je la fino de la parado, Prezidanto Maŭ iris de la centro kaj paŝis laŭlonge de la estrado kaj ĝoje svingis sian ĉapon al la popolamasoj en la placo kaj al la fremdaj vizitantoj kaj delegacioj sur la terasoj malsupre.

En la vespero kolonoj da serĉlumo kaj brilegaj, diverskoloraj elektraĵoj lampoj donis al la centro de la urbo eksterordinarajn belecon kaj imponecon. Sub gigantaj ruĝaj lanternoj sur la Tien-an-pordego iluminigis la du konstantaj sloganoj elstarantaj sur la muro kaj "Vivu la Granda Unuiĝo de Ĉiuj Popoloj tra la de la pordego: "Vivu la Popola Respubliko de Ĉinio" Mondo." Oni tiel aranĝis ke dancoj daŭris tra la tuta nokto en publikaj placoj kaj parkoj kaj ankaŭ en fabrikoj, lernejoj kaj universitatoj.

I. K.

Denove baldaŭ alvenos la laborista festo Majtago. Ĉiujare en tiu ĉi tago ni laboristoj sentas eksterordinaran ĝojon. Kial? La kialo estas tre simpla: unue pro ke Majtago estas festo de ni laboristoj kaj ĉiujare en tiu ĉi tago laboristoj en la tuta mondo celebras sian feston; kaj due pro ke post ĉiu Majtago la konstruo de nia lando estas antaŭenpuŝita grandan paŝon. Mi prenu nian enfosan teamon kiel ekzemplon. De Majtago lastjara ĝis Majtago ĉijara ni jam havas grandan progreson en ĉiu ajn flanko. En produkto, ĉirkaŭ la tempo de pasintjara Majtago, la plej alta rekordo de enfoso atingis nun iom pli ol cent metrojn pomonate. Kaj kiel rezultas nun? En ĉiu ajn monato nun ni povas enfosi 300-400 metrojn kaj la plej alta rekordo eĉ atingis pli ol 479 metrojn. Precipe informiĝinte pri la uzo de bakteria armilo de Usona imperiismo la laboristoj ege indignis kaj ĉiuj esprimis sian firmvolon pliplene pliprodukti kaj ŝpari por helpi la Volontulojn kaj Korean Popolan Armeon venki la Usonian imperiismon. Plie ekde aprilo laboristoj en nia minejo disvastigas konkursan kampanjon por ruĝa flago kaj decidis per nova rekordo de 500 metroj de pomonata enfoso bonvenigi ĉijaran Majtagon.

Plialtiĝis produkto, sekve plialtiĝis ankaŭ viv-nivelo de laboristoj. Depost last-jara Majtago ĉiumonate nia teamo superplenumis la taskojn kaj ĉiumonate la teamanoj gajnis superplenuman premion. Prenu min kiel ekzemplon. Mia salajro estas jam sufiĉe alta, sed kelkiam la gajnita superplenuma premio estis pli alta ol la salajro. Havante monon laboristoj postulas plibonigon de la vivo. Ni aĉetis brak-horloĝojn biciklojn, vestaĵojn, litajojn . . . En la last-jara Majtago en nia teamo estis ankoraŭ du senedzinuloj, nome Caŭ San kaj Han Joŭ-kuej. Sed ĉi-jare ili ambaŭ edziĝis. Han Joŭ-kuej estas

veterana laboristo. Li laboras kiel laboristo en minejo ekde sia 19-jara aĝo kaj nun li havas jam pli ol kvardek jarojn. Li estas homo honesta, senartifika kaj sperta en la tekniko de sia profesio. Antaŭ la liberigo li foje edziĝis, sed pro tiama lia malalta salajro, nepovanta vivteni eĉ lin mem, lia edzino baldaŭ foriris de li. De tiam li vivis ĉiam senedzinan vivon kaj suferis sola ĉion maldolĉan rekte ĝis la liberigo kaj nur tiam li finis sian suferplenan vivon. Nun li vivas ĉiam pli komforte kaj manĝas ĉiutage bonan manĝaĵon. Kaj estas konvene ke post la geedziĝo tiu ĉi maljunulo ĝuos pli feliĉan vivon en venontaj tagoj. Ĉu ekzistas ankoraŭ homo, kiu pro tio ne ĝojus kaj ne metus sian tutan forton en produkton!

Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi estis ĝuanta libertempon en la ripozhejmo de nia minejo, subite mi ricevis sciigon de la superuloj, ke mi venu al Pekino.

Komence mi supozis ke oni venigis min por partopreno de ia kunveno, sed post kiam mi alvenis al la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, mi eksciis ke mi estis sendota al Sovetunio por tie ĉeesti la manifestacion de la Majtago-festo. Mi ĝojas, sed samtempe iom maltrankviliĝas. Kvankam mi gajnis iom da atingajoj en produkto, tamen tio estas tre fora de tiom, kiom mia devo postulas. Plie la atingajoj estas gajnitaj per merito de komuna laboro. La gloro, kiun hodiaŭ mi ricevas, estas donita de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. Tiu gloro estas kuraĝigo por mi, kaj mi decidus zorge lerni la progresajn spertojn de la antaŭiranta Sovetunio, unuiĝi kun laboristoj al pli energia laboro en produktado kaj zorge konduki sekuran produkton por pli frua plenumo de la glora tasko de pliprodukto kaj ŝparo.

Trad. K. Ĉing

Ĉiam pli Felica

Labormodelo

Ma Liu-haj

Avicenna, da Vinci, Hugo kaj Gogol Rememorataj

Granda kunveno celebranta la datrevenojn de Avicenna, da Vinci, Hugo kaj Gogol okazis en Pekino je la 4-a de majo, la Ĉina Junula Tago.

Kuo Mo-ĵo, prezidanto de la Ĉina Popola Komitato por Mondpaco kaj kontraŭ Usona Agreso; Maŭ Tun, vic-prezidanto de la Tutĉinia Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj; Vu Ju-ĉang, vicprezidanto de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio; Li Se-kuang (J. S. Lee), prezidanto de la Tutĉinia Federacio de Natursciencaj Societoj; Liang Ŝi, prezidanto de la Tutĉinia Asocio por la Disvastigo de Scienca kaj Teknika Scio; Li Te-ĉuan, prezidanto de la Ĉina Ruĝkruca Societo; kaj Fu Lian-ĉang, prezidanto de la Ĉina Medicina Asocio.

Meze de tondraj aplaŭdoj, la prezidantaro suriris sur la estradon kune kun la de nia lando invititaj partoprenantoj Yves Farge, prezidanto de la Franca Landa Packonsilo; Antonio Banfi, itala senatano kaj profesoro de filozofio; Claude Roy, franca verkisto kaj poeto; Ettore Pancini, itala fizikisto, kaj Guisepe de Santi, itala filmdirektanto.

Inter la 1,200 ĉeestantoj estis verkistoj, artistoj, poetoj, sciencistoj, profesoroj, medicinistoj kaj laborherooj. Ankaŭ ĉeestis la sindikataj delegitoj de Danlando, Svedio, Germanio, Cejlono, Irano kaj Alĝerio, membroj de la Korea Popola Delegacio kaj la Hungaria Ŝtata Popola Ensemblo; la fame konata ĉilia artisto Jose Ventonelli; S-ino Farge; S-ino Roy; kaj S-ino Vetonelli. Krome, diplomaciaj personaroj de diverslandaj ambasadorejoj en Ĉinio ankaŭ alestis.

En sia malferma parolado sub la titolo "Por la Afero de Paco, Demokratio kaj Progreso", Kuo Mo-ĵo elmontris ke la memorfesto estas por helpi la interfluon de kulturo kaj rezulte de tio "la granda unueco de popolo tra la mondo fine fortiĝos kaj ĉi tiu granda unueco garantios al la homaro senfine brilan estonton."

Telegramo de Nikolaj Tiĥonov, en la nomo de la Sovetia Packomitato, esprimis esperon por "nova, pli intima amikeco kaj kultura kunlaboro inter popoloj en la nomo de paco tra la tuta mondo."

La halo resonis de aplaŭdoj, kiam Yves Farge legis mesaĝon de la Franca Pac-komitato. Li kondamnis la Usonajn imperiistojn pro "parolo pri milito, instigo de malamo, konstruado de barieroj inter popoloj, daŭrigo de korupto kaj la uzado de minacoj kaj subigo de scienco al la preparo de pogranda detruo."

Poeto Roy rememoris la kortuŝan mesaĝon de Hugo al la Kongreso de Paco en 1869, "Mi salutas la estontan revolucion." Imageme parolante al la tombo de Hugo el Pekino, li diris, "Majstro, via espero realiĝis. Via memoro estas honorata ĉivespere en ĉiuj ĉefurboj de paco. Ĝi estas honorata en nova Ĉinio en Pekino. Vi vivis, suferis, kreis ne vane."

Kun la kongreso estis aranĝita ekspozicio pri la vivoj kaj verkoj de la kvar gigantoj. Kaj en la vespero okazis vesperkunveno kunvokita de la suprediritaj sep popolaj organizoj, por regali la fremdajn gastojn. Tie oni prezentis "La Revizoro"-n, la fama teatra verko de Gogol, kaj ankaŭ oni deklamis la poemojn "La Reĝa Robo" kaj "La Lumo" de Hugo. (Fukango)

Majtagaj Gastoj

Sindikataj delegacioj el 19 landoj—Sovetio, Rumanio, Danio, Svedio, Ĉeĥoslovakio, la Germana Demokrata Respubliko, Vietnamo, Cejlono, Britio, Hindio, Aŭstralio, Koreio, Bulgario, Hungario, Polio, Mongolio, Birmo, Irano kaj alĝerio—ĉeestis ĉijaran Majtagan celebron en Pekino.

Ĉe akcepto en honoro de la delegitoj, Liu Ŝaŭ-ĉi, honora prezidanto de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, diris, "La nacia kaj internacia unueco de la laborista klaso estas la plej fundamenta garantio por la unueco de ĉiuj laborantaj popolanoj por venki la komunan malamikon kaj por ilia liberigo."

La estro de la Sovetia delegacio, A. Ŝevĉenko, diris al Ŝinhua-a Novajejo, ke la amikeco inter la Sovetia kaj ĉina popoloj estas "severa averto al tiuj kiuj sin trudas sur la rajtojn de la laborantaj popolanoj kaj kompletas ekigi novan mondmiliton." Hinda delegito, S. Saksena diris, "Sindikataj delegitoj ĉi tie el Sovetio, Ĉinio kaj Hindio reprezentas 1,100 milionojn da popolanoj de ĉi tiuj tri grandaj nacioj. Kun ĉi tiuj tri grandaj nacioj firme unuigitaj en defendo de paco, milito certe ne okazos."

Delegacio de la Ĉeĥoslovakia Registaro por intertrakti kaj subskribi kontraktojn de kulturo, scienco, tekniko, poŝto kaj telekomuniko kun Ĉinio alvenis Pekinon je la 12a de aprilo.

La delegacio konsistas el sep membroj estrata de V. Kopecky, ministro de Informo kaj Kulturo de la Ĉeĥoslovakia Registaro.

Je la 6a de majo, kontraktoj de kulturo, scienco, tekniko, poŝto kaj telekomuniko inter Ĉinio kaj Ĉeĥoslovakio estis subskribataj en Pekino.

Vespere de la 9a de majo, Prezidanto Maŭ Ze-tung akceptis V. Kopecky, kaj membrojn de la delegacio. En ceremonio post la akcepto, V. Kopecky en la nomo de Prezidanto Gottwald prezentis aŭtomobilon al Prezidanto Maŭ Ze-tung.

Hindia kultura delegacio, estrata de S-rino Vijajalakŝmi Pandit, kaj Birma kultura delegacio, estrata de la Hon. U Tun Pe, vizitis Ĉinion je la invito de la Centra Popola Registaro. S-rino Pandit diris je sia alveno, "Apenaŭ estas iu alia ekzemplo en historio de du grandaj landoj, najbaraj unu al la alia, vivantaj en paco unu kun la alia dum miloj da jaroj." Parolante pri la fruaj pioniroj kiuj vojaĝis en amikeco kaj paco inter la du landoj, ŝi esprimis siajn ĝojon kaj fieron ke la delegacio estas vokita iri en iliaj piedmarkoj.

Ĉe akcepto en honoro de la Birma delegacio, Ĉang Han-fu, Vicministro por Eksterlandaj Aferoj, diris, "Amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj Birmo estas grava faktoro por la paco de Azio." La prezidanto de la Birma kultura delegacio en respondo deziris prosperon al la Ĉina Popola Respubliko kaj urĝigis daŭran kulturen interŝanĝon inter la du landoj.

Ambaŭ delegacioj estis akceptitaj de Ĉefministro Ĉou En-laj kaj de Prezidanto Maŭ Ze-tung. La delegacioj vizitis industriajn centrojn, kulturajn, edukajn kaj sciencajn instituciojn kaj bonekonatajn pitoreskajn lokojn de historia intereso en Ĉinio.

Atesto de Bakteria Milito

Personaro de la Usona aerforto kaptita en Koreio provizis nerefuteblan ateston de la krimo de la Usona registaro en grandskala, intencita uzo de bakteriarmiloj.

Je la 11 ptm., la 13a de januaro, niaj fortoj paffaligis Usonan B-26 aeroplanon, n-ro 600, ĉe, Anju. La aeroplano havis kvarhoman anaron. Du el ili, maŝinisto Campbell kaj bombardisto Downes, mortis kiam la aeroplano estis frapita. La aliaj du paraŝutis kaj estis kaptial de la popolaj volontuloj apud Sunan. Ili estas Kenneth Lloyd Enoch, leŭtenanto, navigisto, seria n-ro A02069988 kaj John Quinn, leŭtenanto, piloto, seria n-ro 17993A. Ili ambaŭ apartenas al la 8a Skadro, 3a Grupo, 3a Bomb-alo, de la Usona 5a Aerforto.

Pro manko de spaco, ĉi tie ni nur tradukis la publikan leteron de Enoch al la Ĉinoj Popolaj Volontuloj. Krom ĉi tiu letero, Enoch kaj Quinn ambaŭ faris deklarojn malkaŝante la Usonan bakterian militon Quinn faris radiodisaŭdigon kaj Enoch skribis alian leteron al sia familio.—Red.

Mia nomo estas Kenneth L. Enoch. Mi estas usonano de Youngstown, Ohio. Mi estis naskita la 14an de januaro 1925, kaj mi estas nun 27-jara. Mi finstudis en altlernejo kaj havis du jarojn de kolegio. Mi estis envicigita en la aerarmeon la 7an de junio 1943. Nun mi estas leŭtenanto kaj navigisto por la 8a Bomb-skadro, 3a Bombgrupo, 3a Bomb-alo de la 5a Aerforto staciigata en Kunsan, Koreio.

La 25an de aŭgusto, 1951 de la 1-a ĝis la 3-a posttagmeze, mi ĉeestis sekretan prelegon pri biologia militado donita en la grundo-lernejo en Iŭakuni, Japanio. Tiu ĉi prelego estis donita de civilulo s-ro Wilson. Ĉeestis 25 el ni la prelegon, 10 pilotoj kaj 15 navigistoj, kaj laŭ rango estis 4 kapitanoj, 15 leŭtenantoj kaj 6 subleŭtenantoj. Inter la pilotoj estis Kapitano Lemak, Leŭtenanto Broughton, kaj Leŭtenanto Schmidt. Inter la navigistoj estis Leŭtenanto Hardy, Leŭtenanto De Gaugh, Leŭtenanto Brown, Subleŭtenanto Zielinski, Subleŭtenanto Larson, Kapitano Nelson, kaj mi mem. La prelego koncernis la diversajn manierojn por fari bakteriologian militadon per faligo de bomboj enhavantaj bakteriŝarĝitajn insektojn, per disvastigo de bakteripolvo per bombo aŭ per ŝprucmetodo, per faligo, per paraŝutado de malgrandaj bestoj kiaj ratoj por porti bakteriojn kaj insektojn, per bakteriologia malpurigo de lagoj kaj akvofontoj, kaj per faligo de folietoj, papero, skribiloj, sapo, nutraĵo, vestaĵoj kaj aliaj bakteriportantaj objektoj. Tiaj bakterioj kiel tiuj de tifo, tifoido, malario, flava febro, disenterio, pesto, ĥolero kaj variolo*, same kiel de multaj aliaj malsanoj povas esti uzataj, kaj puloj, muŝoj, pedikoj, moskitoj kaj aliaj insektoj povas esti uzataj por disvastigi bakteriojn. Ankaŭ ratoj kaj aliaj malgrandaj bestoj povas esti uzataj por porti insektojn kaj bakteriojn kiaj puloj kaj pest-bakterioj. La moskito portas bakteriojn de malario kaj flava febro, kaj la bakterioj de aliaj malsanoj estas portataj de muŝoj, puloj kaj pedikoj. La bakteribomboj estas plej bone faligataj de malgranda alteco kaj per malgranda flugrapideco kun la maksimumo de 200 mejloj por ĉiu horo kaj 500 futoj de alteco, per malaltnivela kaj ne glitanta bombado. La prelego estis enklasisgita kiel tre sekreta.

Ĉe la regula misio-instrukcio la 1-an de januaro 1952 la instrukciofiro de grupoperacioj Kapitano Carey donis al mi la ordonon en la formo de hazarda admono, doni precizan atenton al "neeksplozaj bomboj". Efektive, estas sendube ke kiam bakteribomboj komencis esti uzataj, sed pro sekreteco, ili diris al mi "neeksplozaj bomboj". Kaŭze de kapmalvarmumo mi estis anstataŭigita ĉe tiu misio per leŭtenanto Hardy, alia navigisto.

En la nokto de la 6a de januaro, 1952, mi flugis kun Kapitano Amos, piloto, kaj Serĝento Tracy, maŝinpafisto. Kiel kutime, ni flugigis B-26-tipan aeroplanon. Ni ekflugis je 0300 kaj je 0400 la 7an de januaro, 1952, ni faligis 2 bakteribombojn ĉe Huangju, Norda Koreio, kaj revenis al Kunsan je 0500. Ni raportis al la grupa sekretservo-sekcio la plenumon de la instrukcio, raportante al la serĝento, ke ni faligis du "neeksplozajn bombojn" ĉe Huangju. Tio estas por sekreteco, ĉar la superaj aŭtoritatoj sciis, ke tiuj ĉi estis efektive bakteribomboj.

En la nokto de la 10a de januaro, 1952, denove en B-26 kun Kapitano Amos kaj Serĝento Tracy, ni ekflugis je 0300 kaj je 0410 ni faligis 4 bakteribombojn ĉe Ĉunghua, Norda Koreio, revenantaj al Kunsan je 0515 la 11-an de januaro, 1952. Ni raportis al la serĝento, ke ni faligis 4 "neeksplozajn bombojn" ĉe Ĉunghua, por daŭrigi la sekretecon kiel eble plej bone.

Nun mi estas kaptita de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj traktata kiel amiko. Mi estas bone nutrata, bone vestata, ricevis medicinan kuracadon, cigaredojn, dolĉaĵojn kaj multajn aliajn afablaĵojn. Mi vidis la veron kiel presita en la demokrata ĉina gazetaro, kaj ĉiuj ĉi veroj kaj afabla traktado montras tiom pli klare la mensogojn kaj la nevereman militpropagandon de la radio kaj gazetaro de Wall-strato, kiuj prezentas la ĉinojn kiel barbarajn krimulojn kaj kiuj igas la Usonan soldataron kredi, ke se kaptitaj, ili estos pafmortigitaj aŭ pli malbone. Mi komencas vidi tre klare, ĝuste kiu estas la pacamanto kaj kiu estas la militincitanto respondecata por tiu ĉi malhumana milito, kaj mi decidis batali por paco kontraŭ Wall-strata kapitalismo, por purigi mian konsciencon de miaj pasintaj eraroj. Mi estas plena de decidemo aliĝi al la pacamanta kampo, kaj de decidemo fariĝi nova homo.

Kenneth L. Enoch
La 8an de aprilo, 1952

* La kaŭzo de tifo kaj malario estas respektive *Rickettsiae* kaj *Plasmodiae*. Variolo kaj flava febro estas kaŭzataj de du malsamaj specoj de filtra viruso. *Nature*, ne estante medicinisto, la kaptito miksis ĉi tiujn infektajn kun patogeniaj bakterioj.—noto de aŭtoritato en Ĉinio pri tropikaj kaj infektaj malsanoj, D-ro Huej-lan Ĉung, M. D. Universitato de Novjorko; eks-ano de la Reĝa Societo de Tropikaj Medicino kaj Higieno, Londono; eksploristo en la Tropika Instituto, Hamburg, Germanio; profesoro de interna medicino de Ĉina Unia Medicina Kolegio kaj Medicina Kolegio de Pekina Universitato.

Ĝojo de Heroo

Pri la vivo de la koreaj popol-armeanoj sur la orienta fronto

Ho Ju

La milit-zono de orienta Koreio estas ĉeno da altegaj montoj, sur kiuj kreskas densaj arbaroj kaj serpentumas malebenaj vojetoj. Tie multajn lokojn neniu vizitas tutjare. Dum printempo kaj aŭtuno, la supron de montoj vualas tuttage densa nebulo. En vintro falas grandaj neĝflokaj kaj ĉion kovras neĝtavolo kelk-futojn dika. Eĉ en aprilo, kiam la malvarma vento el la maro blovas al la montoj, ankoraŭ flugas neĝeroj. Sur ĉi tiu batal-fronto de altega montaro kun densaj arbaroj kaj profundaj valoj kaj rapidaj torentoj, la batalantoj de iu unuo de la Korea Popola Armeo faris ĉiun el la montoj nedetruibla fortikajo.

Je la komenco de la printempo mi vizitis la popolajn armeanojn, kiuj gardis sur la montaro pli ol 1,100 futojn alta. Ili venkis multajn malfacilaĵojn tie kaj kreis ĝojan vivon en la batal-kampo.

Kiam mi iris en ilian batal-kampon, mi vidis ke kelkaj armeanoj sidantaj ĉe la buŝo de ŝirmejo kantis "Kanton de Rekognoskanto", kiu eĉe resonis inter la montoj kaj arbaroj. Sur la granda arbo apud la buŝo de la ŝirmejo pendis murgazeto el betulŝelo kun artikoloj skribitaj de la soldatoj pri la "Brava Batalo de Maŝinpafisto Heroo Bak Kuan-jung", pri "Kim Suk-bok Kiu Faligis Du Aeroplanojn per Fusilo", kaj aliaj pri modelaj agadoj kaj spertoj en batalo. Sur la tabulo ankaŭ algluis multaj desegnaĵoj kaj karikaturoj faritaj per ruĝa aŭ flava teroj aŭ ligna karbo. En la ŝirmejo la batalantoj bone aranĝis sian hejmon sur-frontan. Sur la pafiltenilaro orde viciĝis la aŭtomataj pafiloj, sur ligna breto apud la muro kuŝis multaj libroj kaj gazetoj, sur la hejtata brik-lito sterniĝis mato farita de la batalantoj el arboŝelo, sub la "plafono" pendis ŝnuroj da ruĝaj folioj kolektitaj de la batalantoj sur la altaj montoj. Arto-geniaj soldatoj el pinŝelo kaj arbo-branĉoj faris artefaritajn montojn kaj homajn figurojn, kaj ankaŭ el pasto-miksita tero faris naci-stilajn pentraĵojn—"Batal-kampo", "Pafado", "Sunleviĝo ĉe la Monto Kimkang", "Akvovalo Ĉoĵang", k.t.p. Ĉiu desegnaĵo elmontris la profundan amon de la koreaj armeanoj al la bela patrolando.

Iu regimenta komandanto de la Popola Armeo kondukis min al la granda kaj hela "subtera klubo", kiu povas enteni pli ol 300 homojn. En la klubo estis scenejo, ĉe kiu pendis grandaj portretoj de Generalisimo Stalin, Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj Generalo Kim Il Sung. Sur la muroj pendis silk-tekstilaĵoj de Usonaj paraŝutoj, sur kiuj algluiĝis bildoj el tranĉitaj el ilustritaj gazetoj eldonitaj en Sovetunio, Ĉinio kaj Koreio. Tiuj ĉi bildoj dekoraciis la klubon tre bela. Sur la novaj tabloj kuŝis diversaj libroj, ilustritaj gazetoj, ludkartoj kaj ŝakludiloj. Ĉiufoje post kiam la batalantoj atakis aŭ rebatis la malamikojn, ili venas ĉi tien por legi, ŝakludi aŭ kartludi.

Ĉiu oficiro kaj soldato de la Popola Armeo ŝatas kanton kaj dancon, kaj tre amas kulturan kaj amuzan agadojn. Eĉ dum la malfacilaj militaj tagoj, iliaj kantoj ne dronis en la tondroj de kanonoj; tiuj ĉi kantoj kaj dancoj elmontris la ardan batalvolon de la korea popolo. En ĉiu regimento, kiun ni vizitis, stariĝis sekcioj de muziko, danco, literaturo, poem-recitado, k.t.p. La

plejmulto de la oficiroj kaj soldatoj aliĝis al tiuj ĉi organizoj. Ĉiu-monate ili okazigas konkurson. La plej bonaj verkoj kritike selektitaj estas publikitaj sur la murgazeto, aŭ presitaj en broŝuroj kaj disdonitaj por legado. Teatraĵoj estas ofte prezentitaj en la subtera teatro de la militkampo. Batalantoj de ĉiu armespeco, ĉiu regimento elektis la plej bonajn aktorojn por prezenti la plej eminentajn teatraĵojn de ili verkitajn. Ili surscenigas ambaŭ siajn malfacilajn batalojn kaj streĉan, ĝojan milit-kampan vivon. La batalantoj, kiuj gardis la "Korŝiran Monton" ludis du dramojn, mokantajn la fiaskon de Van Fleet ĉe "Korŝira Monto". Unu estas nomita "1211 Altaĵo" kaj alia "Ĝuste je 30 post la 5a". La batalantoj de alia regimento kolektive verkis dramon, laŭdantan la meriton de la batalanto Hu Suk, kun la titolo "Heroo Hu Suk Ricevis Leteron el Hejmo". Ankaŭ rekognoskantoj verkis dramon pri sia batala vivo kun la titolo "30 li-ojn malantaŭ la Malamikoj". La batalantoj lerte priskribis multajn heroajn figurojn en siaj verkoj.

Mi multfoje aŭdis baladon, poemo-recitadon kaj rigardis teatraĵojn prezentitajn de la Popola Armeo. Ekzemple, la batalgrupo de "Kim Kjung-ĉel" de iu armeunuo verkis kantojn priskribantajn la fortegan pactendaron "Centoble, Miloble", "Venko", "Amikeco inter Ĉinio kaj Koreio", k.t.p., forte reflektantajn ilian fidon je siaj fortoj kaj venko. La de ili montritaj malamo al la malamikoj kaj senkompare varma amo al la popolo estas kortuŝaj. Ĝuste kiel iu juna komunika soldato de la Popola Armeo diris al mi: "Nun mi havas nur unu pasion: malamo al la malamiko; unu esperon: ekstermo de la malamiko; ni ja havas malfacilaĵojn, sed la revolucia optimismo kaj firma decido ekstermi la malamikojn ĉiam ilin venkas."

Kun tiaj fortaj volo kaj pasio la junaj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Armeo batadas la malamikojn. Dum longaj vintraj noktoj, sur la supro de monto kovrita de neĝo, preskaŭ ĉiutage venis raporto de venko. La surprizatakantoj, rekognoskantoj kaj anti-tankistoj eliris el la ĝojplena klubo, el la komforta ŝirmejo, kunportis armilojn, kaj atakis la malamikojn spite neĝventegon. Kiam ili revenis, nova rakonto de venko ekdisvastiĝis. En la klubo ankaŭ aperis novaj poemoj kaj dramoj. La konata surprizatakista heroo Li Ku-ha kun tri batalantoj atakis la malamikan postenon en malluma nokto, detruis 13 tendojn kaj mortigis pli ol cent malamikojn. La surprizatakista grupo de Ĵon Ĉang-mo naĝis trans riveron en frosta nokto, surgrimpis neĝmonton kaj ekstermis pli ol cent malamikojn en unu nokto. La batalgrupo de Po Ŝan-ju tutnokte rampis sur la tero neĝ-kovrita por meti minojn, kiuj detruis atakantajn tankojn de la malamikoj. Ĉio ĉi estas la novaj enhavoj de iliaj kantoj kaj dramoj.

Sur la orienta fronto la komandantoj kaj batalantoj de iu unuo de la Popola Armeo gardstarantaj sur alta monto kiel agloj venke trapasis la longan vintron kaj nun ili bonvenigas la duan printempon de batalo.

Tradukis: W. S. Ho

Venko super Sekegeco

Su Ming

Antaŭ malpli ol tri jaroj sekegeco estis vorto de teruro en Ĉinio, kiu aŭguris mankon, malsaton, ŝuldojn kaj morton por dekoj da milionoj da homoj ĉiujare. Sekegeco estis grandparte homo-farita, la rezulto de malnova misregado, kiu pereigis la protektantan verdan kovraĵon de montetoj kaj kamparo. Sekeco ankaŭ estis la rezulto de la korupto de la reganta klaso, de la senindulga ekspluatado kaj la malriĉeco de la kamparanoj, kio permesis al la akvo-instalaĵoj disfali kaj malhelpis la fosadon de putoj aŭ la konstruadon de akvokonservejoj kaj kanaloj. Sub tiaj kondiĉoj sekeco fariĝis preskaŭ jara okazaĵo. La malnovaj reĝimoj de militaristoj kaj Kuomintangoj ne prenis efikajn rimedojn por kontraŭbatali tiun ĉi malbonon aŭ mildigi ĝiajn rezultojn.

Sed en du jaroj la Popola Registaro akiris surprizajn rezultojn en batalo kontraŭ sekeco, same kiel en la kampanjo kontraŭ inundoj. Ampleksaj projektoj estas komencitaj por subigi ĝiajn efikojn.

La printempo kaj somero de 1951 havis ĉiujn signojn de granda sekeco. En Norda, Nordokcidenta Ĉinio kaj Interna/Mongolio lavintra neĝfalo estis nur duono de normala. Eĉ en provincoj kaj regionoj kie pluvo estas ĝenerale abunda, post malseka printempo venis sekegiga somero. Entute 125 milionoj da muoj da kulturita tero estis minacataj de sekeco kaj rikolto-malsukceso.

En la malnova tempo tiaj kondiĉoj signifus ege divastigitan malsaton. Sed gvidata de la Popola Registaro kaj la Komunista Partio la popolanoj povis efike mobilizi siajn helprimedojn kaj venki la sekecon. Sur landa skalo la rikolto en 1951 atingis 92.8% de iam ajn plej alta produkto. Ĉinio povis eksporti grenon por mildigi malsaton en Hindio. Kotonon superis la antaŭmilitan rekordon per 33%.

Kiel la Venko Estis Gajnata.

La Popola Registaro faris zorgemajn planojn por venki tiun ĉi malnovan malbonon. Longdaŭraj projektoj estas komencitaj por grandskala replantado de arbaroj, la kreado de forstzonoj, la konstruado de grandegaj akvokonservejoj kiel ĉe la riveroj Huaj, Jungting kaj Pi, kaj aliaj instalaĵoj por akvokonservo.

Dume rimedoj por mallonga periodo pruviĝis de decida valoro en la batalo kontraŭ la efiko de sekeco. Inter la plej gravaj de tiaj rimedoj estas jenaj: 1. la pli vasta uzado de sekecrezistantaj semoj kaj pli bonaj metodoj de plantado por kontraŭi sekecon; 2. la pli bona utiligo de ekzistantaj akvofontoj kaj la disvolvo de novaj fontoj.

Ĉie la kontraŭ-sekeca movado rapide disvolviĝis en amaso-kampanjo. Metodoj estis diversaj. La celo estis utiligi la plej efikajn rimedojn por ĉiu aparta loko.

Per tiaj klopodoj, ekzemple, en Norda Ĉinio 70% de la tuta kotonareo tuŝita de sekeco estis semitaj.

Granda sagaco estis montrita de la terkulturistoj por gardi la junajn plantidojn. En Hopej, Ŝantung kaj Honan antaŭ la semado de la koton- kaj gaŭliangkampoj, la tero de la seka supraĵo estis forprenita per fosilo kaj la semoj semitaj en la malseketan teron sub ĝi, kaj poste rekovrita per la seka supra tero, kiu estis firme premata sur la alian por konservi la malsekecon.

Kelkaj regionoj plibonigis tiun ĉi metodon. Kiam la semoj estas semitaj, malseketa tero prenita de lokoj, kie ne estis semita, estis uzita por kovri ilin, kaj la tuto protektita per seka, firme premita supra tero. Ĉe aliaj okazoj la semoj estis semitaj kune kun unu colo da malsekigita gaŭliang- aŭ maiz-pajlo por doni pluan malsekecon. En 1951 tri kvinonoj de la kotonkampoj de Hopej estis semitaj laŭ tiu ĉi metodo.

Alia metodo estis semi kvin ĝis ses semojn, konvene interspacigite, en unu solan truon. Kiam ili komencis ĝermi, kvar aŭ kvin truetoj estis faritaj ĉirkaŭ ĉiu planto per akra, pinta bastono kaj akvo estis verŝita en ilin el poto. Tiel baldaŭ kiel la akvo estis sorbita, la truetoj estis plenigitaj per tero. Meznombro dudek siteloj da akvo estis necesaj por ĉiu muo tiel semita. Kvinono de la kotonkampoj de Hopej estis plantita tiamaniere. La sukceso de tiaj metodoj montriĝis per la rekordrompa rikolto.

Aliaj regionoj komencis la kampanjon kontraŭ sekeco multajn semajnojn antaŭ la printempa semado. Ili komencis per konservo de akvofontoj.

Spertaj Batalantoj kontraŭ Sekeco

En Ĉahar-provinco Li Ho-vang, membro de la Komunista Partio, kiu gajnis famon kiel modela laboristo en akvokonservado en 1950, mobilizis la kamparanojn de sia distrikto por glaciokonservo. Tra truoj en la glacio kovranta la riveron, ili baris la akvofluon sub la glacio per pajlo, kaj la akvo estis devigata flui sur la supraĵon, kie ĝi almetis novan kruston al la glacio. Poste ili tranĉis la glacieron en blokojn kaj transportis ĝin al la kampoj, kie la printempa degelo faris la ceteron. Tamen tio ne estis la fino de la batalo, ĉar pli malfrue tiun printempon la trunketoj de milio haltis kreski, kiam ili estis nur ĉirkaŭ dudek centimetrojn altaj. Nenia pluvo falis dum aprilo kaj majo. Tamen multaj kamparanoj ankoraŭ sub la influo de malnovaj ideoj hezitis akvumi la milion tiel frue en la jaro pro timo, ke ili povos difekti ĝin. Sed Li kun siaj kolegoj akvumis la milion sur 4000 muoj da tero dum 8 tagoj. Baldaŭ poste la plantoj komencis kreski denove, dum tiuj en la neakvumitaj kampoj komencis velki. Konvinkite per tio, la tuta vilaĝo sekvis la ekzemplon.

Poste en junio la rivero sekiĝis. La sekegigita tero komencis fendigi. Sed Li kaj liaj kolegoj sciis, ke ankoraŭ devas esti akvo sub la fluejo. Naŭdek homoj laboris en tag- kaj nokt-deĵoroj por farl 50 fosojn en la rivero por ellasi grundakvon sufiĉan por irigacii 2500 muojn da tero. La kontraŭsekeca brigado de Li nun mobilizis 57 kamparanajn domanarojn por ripari putojn kaj akvoradojn. Tio provizis sufiĉe da akvo por aliaj 470 muoj plantitaj je legomoj.

Proksime de la vilaĝo estis rivero neniam uzita por irigacio. Li organizis 100 domanarojn por fosi kanalon de la rivero al la kampoj kaj aliaj 1400 muoj da sekegigita tero estis certigitaj ricevi akvon. Sub tia gvidado de Li Ho-vang kamparanoj de dek vilaĝoj estis tiamaniere ebligataj venki la sekegecon. En 1951 sub severaj sekeckondiĉoj ili povis kolekti rikolton superantan je pli ol 750 tunoj la produkton de 1950, kiu estis jaro de nur malgranda sekeco.

En Feng-vilaĝo, Huajjen-gubernio, ankaŭ en Ĉahar-provinco, ne malpli efikaj rimedoj estis aplikitaj sub la gvidado de Ma Ji-ĉien, kiu estis poste elektita labor-modelo. Krom la semado de kotono en malseketa malsupra tero kaj la uzo de la seka supra tero firme premita malsupren kiel kovraĵo kontraŭ sekigo, Ma sarkis tri aŭ pliajn fojojn dum la sezono anstataŭ la kutimajn 2 fojojn. Tio ankaŭ helpis konservi la grundmalsekecon. Post la someraj pluvoj en julio Ma gvidis la vilaĝanojn en la replantado de 500 muoj da kreskaĵoj, kiuj estis velkintaj sur la trunketoj. Tio estis farita en unu taga rapidlaboro per semoj pruntedonitaj de la registaro. Kiel rezulto de tiuj ĉi rimedoj Feng-vilaĝo kolektis pli ol 70% de meza rikolto, malgraŭ la kondiĉoj de severa sekegeco, kaj sen pli bonaj akvokondiĉoj ol en aliaj suferantaj regionoj.

Estis kamparanoj kiel Li kaj Ma en multaj regionoj kiuj gvidis por batali kaj venki sekegecon. La gazetaro kaj vilaĝaj propagandistoj disvastigis la novaĵojn pri iliaj metodoj kaj sukcesoj.

Pli Bona Uzo de Akvoprovizoj

Pli bona uzo de akvoprovizoj estis ĉefa faktoro en la subigo de sekegeco. La bienuloj en malnova tempo kontrolis ne sole la teron, sed ankaŭ akvovojojn kaj akvofontojn. Ili uzis tiun ĉi monopolon por devigi la kamparanojn pagi ekstrajn kotizojn kaj fari apartajn servojn. Tiu ĉi misuzo estis eliminata per la agrara reformo, sed multaj malnovaj kutimoj, kiuj estis kreskintaj rilate al la uzado de akvo, devis esti eliminataj per specialaj klopodoj de la liberigitaj kamparanoj.

En kelkaj partoj de Ŝansi-provinco ekzemple la kutimo, ke la akvobezonoj de vilaĝoj de la supraj partoj de riveroj devas esti plenumataj antaŭ ol tiuj laŭlonge de la malsupraj partoj. Konsekvence, en jaroj de sekeco, tiuj vilaĝoj ofte povis irigacii siajn kampojn kelkajn fojojn en la jaro, dum la malpli feliĉe lokitaj agoniis pro manko de akvo.

Ankaŭ tiaj nenormajoj estis finitaj baldaŭ post la agrara reformo. Vilaĝoj, uzante la samajn akvofontojn, establis komunajn komitatojn por akvokonservo kaj fiksas justajn regulojn por la pli racia uzo de la disponebla akvo. Kiel rezulto pli da tero povas nun esti irigaciata je pli rapida alterno ol antaŭe. Ekzemple laŭlonge de la Jangvu-rivero en Kuo-gubernio, Ŝansi-provinco, tuta areo de 50,000 muoj da irigaciata tero apartenantaj al dek ok vilaĝoj nun povas esti irigaciata sur bazo de 22-taga alterno, dum antaŭe tio prenis 30 tagojn por la vico de ĉiu vilaĝo laŭ malnova alterno-plano. La akvo, tiel savita, sufiĉas por irigacii ekstrajn 16,000 muojn da tero en aliaj 6 vilaĝoj.

Tiamaniere la batalo kontraŭ sekeco samtempe estis kampanjo por pli racia uzo kaj ekspluato de akvofontoj. Kotonkampoj en Ŝansi kaj aliloke en Norda Ĉinio kutimis esti akvumitaj sulkon post sulko. La batalantoj kontraŭ sekeco enkondukis la sistemon akvumi nur ĉiun duan sulkon. Tio pliigis la produkton per duobligo de la akvoprovizo por irigacio.

Reciproka Helpo

Neniu el tiuj ĉi metodoj de batalado kontraŭ sekeco povus esti doninta vere efikajn rezultojn sen la reciproka helpo inter la kamparanoj kaj registara helpo, kio estas la signo de la nov-demokratia ekonomio de Ĉinio. Ekzemple la kosto de fosado de unu puto estas egalvalora al 2-3,000 ĝinoj da milio, unu akvorado kostas du mil ĝinojn. Nur bienuloj kaj riĉaj kamparanoj povis

sin provizi per tiaj "luksaĵoj" en la pasinto. Nun la kamparanoj kombinas rimedojn por kovri tiajn elspezojn. La registaro ankaŭ donas malavaraĵajn pruntojn. Tiel, de post 1949 la nombro de putoj en Norda Ĉinio pliigis je 50,000 ĉiujare. Plue, sub individua posedaĵo unu sola puto kutimis irigacii ĉirkaŭ 15 muojn da tero. Nun, sub kolektiva direktado ĝi irigacias 20 ĝis 50 muojn kaj en kelkaj esceptaj okazoj ĝis 100 muoj. Laŭ konservativa taksado tial, la novaj putoj konstruitaj povas irigacii kromajn 1½ milionojn da muoj.

En 1949 ekzistis 330,000 akvoradoj en uzo en Norda Ĉinio, en 1950 ili pliigis al 400,000, kaj en 1951 al 510,000 —pliigo de 55% en du jaroj, nombro egala al duono de la nombro de funkciaj akvoradoj konstruitaj en la pasinto!

Tiu ĉi grandega aktiveco bazita sur la pli alta konscio de la liberigitaj kamparanoj kaj la disvolvado de kooperativaj metodoj de laboro igas, ke ĉiuj konstruaj klopodoj de la pasinto ŝajnas esti etaj kompare kun la sukcesoj de hodiaŭ. Kamparanoj de norda Anhuej, ekzemple kombinis rimedojn por fosi 77,561 putojn kaj 6,000 lagetojn en sola jaro 1951. Kiam ĉiu korpokapabla homo en Kajlu-gubernio, Ĵehol-provinco estis petata fosi unu puton, 10,400 putoj estis fositaj. Laboristoj, unuoj de la Popola Liberiga Armeo, studentoj, instruistoj, oficejlaborantoj volontule donis sian helpon al la kamparanoj en la kontraŭ-sekeca kampanjo. Kamparanoj funkciigis la akvoradojn en urĝbezonoj tage kaj nokte.

Intertempe rimedoj aplikotaj dum longa periodo por la malebligo de sekeco estis puŝataj antaŭen. Ankaŭ tiu ĉi laboro kondukita de la Popola Registaro kaj la unuarangaj scienculoj de la lando estas nedisigeble kunigita kun la aktiveco de la kamparanoj amasoj en la konstruado de konservejoj, digoj kaj fosadoj, en la forstigado de vastaj areoj ktp. La kamparanoj de Ĉinio scias, ke la batalo kontraŭ sekeco estas longperioda tasko kaj ne nur serio da urĝbezonoj rimedoj. Kiel rezulto de tiuj ĉi longperiodaj rimedoj la irigaciata areo estis pligrandigita je 17,000,000 da muoj. Ĉirkaŭ 90,000,000 da muoj da tero nun estas certigitaj je irigacio.

Erue en 1952 ŝajnis, ke sekeckondiĉoj povus aperi pro manko de neĝo sur vasta areo. La Konsilo de la Centra Popola Registaro pro tio publikis la okan de februaro direktan por komenci landskalan kontraŭ sekecan kampanjon. La Ĉina Komunista Partio aprobis tiun ĉi direktan kaj donis al ĝi plenan subtenon. La 13an de februaro la Centra Oficejo por Agrikultura Produktado kaj Malebligo de Sekegeco estrita de la Ministro de Agrikulturo okazigis sian unuan kunvenon. Ĉiuj necesaj rimedoj estis planitaj, preparitaj kaj iniciatitaj en la lumo de la lastjaraj spertoj. Aranĝoj estis faritaj por la ekstarigo de sekecbatalantaj organizoj en ĉiuj minacataj regionoj por la preparo kaj provizo de terkulturaj instrumentoj, akvoradoj, medicina ekipaĵo, ĥemia sterko kaj semoj; medicina prizorgo por homoj kaj dombestoj, asigno kaj transporto de nutraĵprovizoj.

Kiel la historio de la lasta jaro montras, sekegeco ne plu povas nuligi la agrikulturajn planojn de Ĉinio. Nova Ĉinio gajnis ankoraŭ alian brilan venkon super malnova malamiko de la popolo. Estas pro tiaj venkoj, ke la popolo povas rigardi antaŭen al la estonto kun neskuebla konfido planante tiun ĉi jaron pliigi grenprodukon je 8% kaj kotonprodukon je 20% super la abunda rikolto de 1951.

Trad. K. Maier



Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj gvidantoj de la Centra Popola Registaro revuas la Majtagan demonstracion de 1952 sur 1 Tien-an-pordego, Pekino. Starantaj de dekstre maldekstren: Vicprezidantoj Ĉang Lan, Li Ki-ŝen kaj Ĉu Tej Prezidanto Maŭ Ze-tung, Vicprezidanto Liu Ŝaŭ-ĉi, Ĉefministro Ĉou En-laj kaj Ĉefsekretario de la Centra Popol Registaro Lin Po-ĉju.

MAJTAGO EN PEKINO



Labormodeloj aklamas la demonstracion



Reprezentantoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj




Kolono de gajaj lernantoj



Dancas hungaraj dancistoj



Belega nokto sur la Placo de Tien-an-pordego



Fervojistoj paradas kun lokomotiva modelo


ATESTOJ PRI LA USO

Ekde la 1-a de januaro, 1952, la Usonaj portantaj insektojn sur la teritorion de Usonaj aeroplanoj faris sian unuan bakci ĉi hitlerismaj krimagoj jam ŝokis

Kontraŭbakteria laboranto sur korea fronto enboteligas muŝojn kaj moskitojn el la bakteria obuso alpaŝita de Usonaj agresantoj je la 7a de marto.



Jen estas bakteria bombo kun malgranda paraŝuto. Da tiaj pestosemiloj la Usonaj agresantoj uzis plej multe.



Speco de bakteria bombo faligita de Usonaj malfermiĝas je du pecoj kaj ellas

Du Usonaj aviadistoj kies aeroplano estis faligita en norda Koreio je la

navigisto Leŭtenanto Kenneth L. Enoch

La unua kaj lasta paĝoj de la letero de Enoch al la Ĉinaj Popolaj Volontulo



An Open letter to the Chinese Peoples' Volunteer Army

My name is Kenneth L. Enoch. I am an American from Youngstown, Ohio. I was born on 14 January, 1925, and am now 27 years of age. I have completed high school and have had two years of college. I was drafted into the air force on 7 June, 1943. At present I am a 1st lieutenant, and a navigator for the 8th Bomb Squadron, 3rd Bomb Group, and the 3rd Bomb Wing of the 5th Air Force, stationed at Kunson, Korea.

On August 25, 1951, from 1 to 3 o'clock in the afternoon, I attended a secret lecture on biological warfare given at the ground school at Iwakuni, Japan. This lecture was given by a civilian, Mr. Wilson. There were 25 of us attending the lecture, 10 pilots and 15 navigators, and by next there were 4 captains, 15 1st lieutenants, and 6 2nd lieutenants. Among the pilots I know Capt. Lemak, 1st Lt. Broughton, and


and press, who picture the Chinese as barbarian criminals, and who lead American troops to believe that if captured, they will be shot, or worse. I am beginning to see very clearly just who is the peace-lover and who is the warmonger responsible for this inhuman war, and I am determined to struggle for peace against Wall Street capitalism, to clear my conscience of my past errors. I am filled with determination to join the peace-loving camp, and with the determination to become a new man.

*Kenneth L. Enoch
8 April, 1952.*


NA BAKTERIA MILITO

agresantoj disjetis grandkvante bakteri-liberigita Koreio. Je la 29a de februaro, erian atakon al Nordorienta Ĉinio. Tiuj la popolojn de la tuta mondo.

Fragmentoj de Usona bakteria bombo. En la cirklo vidiĝas bakteri-portantaj muŝoj kiujn ĝi ellasis.



Fragmentoj de Usona bakteria bombo. En la cirklo vidiĝas bakteri-portantaj muŝoj kiujn ĝi ellasis.



Bakteria bombo M 105, faligita de Usonaj bakteriaj militkrimuloj. La markoj en angla lingvo estas klare videblaj.

13a de januaro konfesis sian partoprenon en la bakteria milito en Koreio.

1. Piloto Leŭtenanto John Quinn

La unua kaj lasta paĝoj de la brodkasta teksto de Quinn



How I Was Forced to Take Part in Bacteriological Warfare by the U.S. War Dept

I am John Quinn, 1st Lt. U.S. Air Force, serial no. 174934, age 29, from California. I joined the Air Force in February 1948, aviation cadet. After graduation I was assigned to the Air University as an instructor and was sent later to Korea to Sunan on December 1, 1951. I was assigned to the 3rd Bombwing, 3rd Group, 5th Squadron, to fly B-26s.

I was shot down on January 13, 1952 and captured by the Chinese People's Volunteers 10 miles S.W. of Sunan when I laid down my arms. They gave me my first realization of the lenient policy treatment. They gave me good food, treated me kindly, gave me warm clothes, and blankets. Their kind treatment made me realize that the Chinese People's Volunteers are truly a peace loving people. The volunteers explained many times their lenient policy of Power to me, they were patient and kind and realized it was difficult for me to understand such a policy but finally I did realize they were a peace loving

I know I have been guilty of a most terrible crime, I realize that I was a tool of Wall Street and I ask that the people forgive me for this crime. I hope that peace loving people all over the world will arise and condemn the crime of Germ Bombs and Bio Warfare which has been started by the U.S. imperialists of Wall Street. I hope that the American people learn the truth and rise up against these war mongers. Wall Street must not be allowed to bring a third world war which will be a disaster to all the peace loving people of the world.

John Quinn
14 April, 1952

LA BURĜONOJ DE LA ĈINA POPOLO

La liberigo de la ĉina popolo kunportis al la ĉinaj infanoj bone ekipitajn infanvartejojn, infanĝardenojn, lernejojn kaj la standardon de la junaj pioniroj por ilin gvidi ĉiam antaŭen.

Bona higiena prizorgo en infanvartejo



Dum leciono pri la naturo en elementa lernejo



La junaj pioniroj estas la standardo de la ĉinaj geknaboj. Ili bone studas siajn lecionojn por akiri riĉajn sciojn, kaj ili ankaŭ fervore partoprenas sportojn kaj ekskursojn por kulturi siajn korpojn. Jen pionira grupeto en ekskurso sur Vanŝou-monto.

Infanoj en Pejĵeng-infanĝardeno en fervora konstruado



Eminenta Vilaĝa Instruisto Ŝe Pej-kjun

Ĉinglan-vilaĝo estas montvilaĝo en Paŭĉing-gubernio, Sungkiang-provinco. Ĉi tie, neniam antaŭe oni proponis pri starigo de lernejo. En la printempo de 1948, kun la altiĝo de la ekonomia vivo, la ĉi-tieaj kamparanoj ankaŭ urĝe deziris lerni kulturon kaj starigi lernejon por siaj gefiloj. Sed ilin ĉagrenis la manko de instruisto. Tiam, estis kvankam kelkaj kiuj studis 6,7 jarojn, tamen pro ilia postrestanta ideologio, la popolamaso ne volis ke ili eduku iliajn gefilojn. Fine, pro la rekomendo kaj elekto de la vilaĝa kunveno de popolaj reprezentantoj, la glora kaj grava tasko estis metita sur la ŝultrojn de Ŝe Pej-kjun.

Ŝe Pej-kjun estis kamparano. Li paŝtis bovon por bienulo kaj laboris kiel kulio sub la regado de la japanaj diabloj.

Venis la Komunista Partio en la jaro 1946. Nur tiam Ŝe Pej-kjun estis liberigita kune kun la popolo loĝanta en Paŭĉing-gubernio. Tuj kiam komenciĝis la likvida batalo kontraŭ la bienuloj, li unua aliĝis al la kamparana asocio. Sub la eduko de la laborgrupo de kamparana movado lia politika konscio alitiĝis, kaj li fariĝis unu el la aktivuloj en la vilaĝo.

Kiam la popolamaso unuanime subtenis lin instrui en la elementa lernejo de la vilaĝo, li tre maltrankviliĝis, nekuraĝante akcepti tiun ĉi taskon. Ĉar, sciante sian malaltan kulturnivelon (li lernis legi malpli ol du kaj duonan jarojn), li timis ke li ne povos bone instrui. Kamarado Li de la laborgrupo kuraĝigis lin dirante: "Ne ekzistas laboro nefarebla. Oni povas, nur se li volas." Helpe de la kamaradoj de la laborgrupo kaj kuraĝigate de la popolamaso, li akceptis la taskon.

En la jaro 1948, la vivo de la liberigita popolo ankoraŭ restis malfacila. Ĉe la stariĝo, la lernejo lokiĝis nur en tri difektitaj kaj malnovaj kabanaj kun pajla tegmento. Sed Ŝe Pej-kjun komprenis la provizoran malfacilon de la popola vivo kaj propravole proponis ne akcepti salajron. Dum la konstruado de la lernejo, por malpezigi la ŝarĝon de la popolamaso li persone gvidis la lernantojn fari ĉion kion ili mem kapablis aŭ povis trovi rimedon por fari neniel ĝenante la popolamason, ekzemple malkonstrui terliton, terstuki murojn, konstrui vandojn ktp. Por la mankantaj skribotabloj, ili kolektis tabulojn kaj alnajlis al ili po 4 apogiloj. Por la mankanta skribilaro en la lerneja oficejo li alprenis el sia propra hejmo. Tial iuj diris al li: "Vi instruas ja malprofite, nenion gajnante sed vian propran perdante!" Li tamen respondis nekonsente: "Mi opinias ke la malfaciloj de ni malriĉuloj estas ankaŭ la malfaciloj de mi mem. Sub la gvidado de la Komunista Partio nia estonto estos brila. Ja ne ĉiam ni vivos tiel malfacile!"

La lernejo estis starigita, kaj la lernantoj estis komencontaj lerni. Tamen libroj mankis. Kion do legi? El la plena elementa lernejo en la urbo li pruntis lernolibron de nacia lingvo, el kiu li mane kopiis lecionon post leciono por la instruado. Estis entute 38 lernantoj. Do por ĉiu leciono li devis kopii po 38 ekzempleroj. Havante libron nun li komencis la unuan instruan horon. Sed kiel instrui? Aritmetikon

li ne kapablis; la ideografojn en la lernolibro de nacia lingvo li povis legi kaj skribi, sed ne klarigi. Fine li devis forlasi la instruadon de aritmetiko kaj instruis nur legadon de la lernolibro de nacia lingvo, postulante nur ke la lernantoj ellernu prononci kaj skribi. Tiam estis ĉie malfaciloj por Ŝe Pej-kjun. Sennombraj malagrablaj kaj atakoj li renkontis. Instruistoj de aliaj vilaĝoj diris ke li ne havas aspekton de instruisto; bienuloj kaj friponoj mokis kaŝe: "Kiu ne scias pri lia grajno da kapablo, per kiu li tamen pretendas instrui?" Sed tio ne ŝancelis lian volon. Li diris: "Rememorante la suferon en la pasinteco kaj vidante la feliĉan vivon en la nuntempo, mi tuj ekhavas forton."

Krom ĉiutaga diligenta lernado, de la jaro 1948 ĝis 1950 Ŝe Pej-kjun partoprenis entute sep fojojn la lernadon de instruistoj en vintra kaj somera libertempoj, dum kiuj li neniun tagon forestis. Ĉiufoje lernado donis al li grandan helpon en politiko, pedagogio kaj kulturo. Ekzemple dum la lernado en la somera libertempo de 1948, li ricevis la poenton nulo en la unua aritmetika ekzameno, sed ĉe la finiĝo de la lernado li gajnis jam 40 poentojn.

Ŝe Pej-kjun ne nur atentis pri la lernado de kulturo kaj pedagogio, sed ankaŭ multe dediĉas sian atenton sur la lernadon de politiko kaj kurantaj aferoj. Ĵurnalo-legado jam fariĝis lia kutimo. Ĉiufoje kiam li ricevis ĵurnalon, li atente legas kaj studas. Novajojn propagandajn al la popolamaso li donas al la propagandistoj, legrondoj de ĵurnalo, aŭ transskribas sur nigran tabulon. Tiamaniere li ne nur altigis sian propran politikan nivelon, sed ankaŭ la politikan konscion de la popolamaso.

En la dua semestro de 1948 la lernejo de Ŝe Pej-kjun aldonis lecionojn de aritmetiko kaj instruis laŭ la regula programo. La nombro de la lernantoj grandiĝis de 38 al 62. De la stariĝo ĝis nun la lernejo eledukis 16 lernantojn posedantajn kulturnivelon de elementlerneja gradigito, 11 el la lernantoj sukcesis trapasi ekzamenon por daŭrigi la lernadon en la plena elementa lernejo, kaj unu partoprenis la lernadon en la lernejo por militaj kadroj.

Ŝe Pej-kjun tre atentis studi la kulturajn direkton kaj politikon de la Popola Registaro, la instrukcion de supera instanco, kaj scipovas labori laŭ aktualaj cirkonstancoj. Li aktive respondis al la alvoko pri saniga edukado. Li opiniis, ke por la sano de la lernantoj, krom disvastigi gimnastikajn agadojn, necesas ankaŭ plibonigi la sanitarajn cirkonstancojn de individuoj kaj en la ĉirkaŭo de la lernejo, plibonigi la instrumentodon kaj malpezigi la ŝarĝon de la lernantoj. Por la disvastigo de gimnastikaj agadoj k.a. ekzistis ja tre multaj malfaciloj. Tamen al la malfaciloj li sin ne submetis. Ekzemple, ĉar la klasĉambro de la lernejo estis malgranda kaj ne ricevis sufiĉe da sunlumo, post interkonsiliĝo kun la vilaĝaj kadroj li gvidis la lernantojn en la eksterleciona tempo ripari la vandon kaj tiel pligrandigis la klasĉambro. Pro la manko de gimnastikaj instrumentoj li vizitis la plenan elementan lernejon kie li desegnis la gimnastikajn instrumentojn kiujn li mem povis fari.

Reveninte sian lernejon li alvokis la lernantojn al kolektado de materialo. Helpe de la vilaĝaj kadroj kaj gepatroj de la lernantoj ili komencis mem fari. Ili mem faris ŝnurojn, teksis reton kaj forĝis ferringojn kaj ferhokojn. Nun la korto de la lernejo estas plena de mem faritaj balancilo, reko, pinpan-pilka tablo. En la korto estas krome tenis-ludejo. Li diris: "Krom instruisto mi estas ankaŭ masonisto, lignajisto kaj feraĵisto." Post kiam li venkis la malfacilojn je la manko de gimastikaj instrumentoj, li ankaŭ kreis novajn ludojn. Nun la lernantoj ĝenerale ekzercas sin per saniga gimnastiko kaj ellernis 6-7 specojn de dancoj kaj kolektivaj ludoj. Ne plu okazas interbato kaj kverelo.

La ĉefa trajto de la laboroj de Ŝe Pej-kjun estas bona interrilatigo kun la praktiko. ekzemple iam li trovis ke inter la lernantoj ekzistas malestimo al la kamparanoj. Post studado li eksciis, ke tiu ideo naskiĝis pro tio ke iliaj gepatroj ĉiam diras al siaj infanoj: "Bone lernu! Ellerninte vi povos ne plu esti kamparanoj." Kontraŭ tiu ĉi fakto li do klarigadis al la lernantoj per ekzemploj el ilia vivo, ke nur laboro povas krei la mondon kaj ke nur laboro estigas veston kaj manĝon. Li konigas al la lernantoj la heroojn de labor- kaj batal-herooj kaj samtempe klarigis ke la Ĉinaj Popolaj Voluntuloj povas tiel brave ekstermi la malamikojn ĝuste por defendi la laborfruktojn de la laboranta popolo kies gefiloj ili estas. Tiamaniere li iom post iom komprenigis al la lernantoj la grandecon de la laboranta popolo kaj forigis el la lernantoj la malestimon al la laboranta popolo.

Li tre atentis la praktikon de la lernantoj. Li ĉiam diras: "Ni ne povas postuli tro multe al la lernantoj; la postulo devas esti konforma al ilia povo. Se ni tro alte taksas la povon de la lernantoj kaj sekve prezentas al ili troan postulon kiun ili ne povas plenumi, la venontfoja mobilizo fariĝos do malfacila." Kelkfoje li trovis ke la lernantoj ne volas iri hejmen post la lerna tempo. Post esploro li eksciis ke ili timas labori hejme post la lerna tempo. Plue studinte li trovis ke ĝenerale la gepatroj de la lernantoj laborigas la lernantojn sen ĝusta celo kaj la laboroj estas tro pezaj, el kio rezultis ke la lernantoj surbuŝe glorigas la laboron sed ideologie ĝin abomenas kaj malestimas. Kontraŭ tiu ĉi fakto li aranĝis kunvenon de la gepatroj, en kiu li klarigis la aferon kaj komprenigis la gepatrojn pri ĝi. Je la konsento de la gepatroj li organizis la lernantojn en grupojn laŭ iliaj loĝlokoj por ke ili pogrube zorgu pri la hejmaj laboroj de fojno-dispecigo, portado de akvo ktp. Tiel la lernantoj tre volonte laboras kaj ne plu timas iri labori hejme post la lerna tempo.

Alia ĉefa trajto de la laboroj de Ŝe Pej-kjun estas studemo kaj iniciativo. En la printempo de 1951, li vidis en la gubernia urbo magian lanternon nove aĉetitan el la provinca ĉefurbo. Li pensis kun admiro ke tiu objekto estas bona instrumento por propagando al la kamparanoj kaj lernantoj. Sed li ne povis aĉeti. Tial li decidis mem fari unu. Por tio li tutan tagon studis en la kultura muzeo. La plej malfacila por li estis la manko de materialo. Reveninte en sian lernejon li mobilizis la lernantojn al kolektado de konvekso lenso kaj aliaj materialoj por fari magian lanternon. Kiam la materialo kolektiĝis li ekkomencis la faradon. Li ĝin elfaris. Sed li trovis ĝin ne bone uzebla ĉe la provado. Pristudante li refaris ĝin.

Sinsekve tra 4-5 fojoj da provado li finfine sukcesis. Kiam la unua serio de lumbildoj prezentigis en la Elementa Lernejo de Ĉinglan-vilaĝo, ĝi estis varme bonvenigata de la lernantoj kaj la popolamaso. La elfariĝo de la magia lanterno multe helpas al la propagandaj laboroj al la kamparanoj kaj por la edukado.

Ŝe Pej-kjun tre atentis pri la produkta kaj leglerna movadoj. Li ofte diris: "Nur bona produkto donas kondiĉojn al ĉiuj aliaj laboroj." Dum la ĉi-printempa organizado de produktado li aktive helpis la vilaĝajn kadrojn fari produktan planon kaj proponis al la vilaĝaj kadroj ke oni devas dividi la laborojn kaj centralizi ĉiujn fortojn bone fari en unu aŭ du "punktoj" por puŝi antaŭen la tutvilaĝan produktadon. Kun la milicaj komitatoj kaj la vilaĝestro li starigis Ŝe Ŝu-ĉun-grupon por diskonigi la spertojn. Li ĉiam utiligis liberan tempon iri al la grupo por helpi ilin fari produktan planon, patriotan pakton, rekomendi al ili produktajn spertojn el ĵurnaloj. Ŝe Ŝu-ĉun-grupo poste fariĝis modela grupo de la tuta vilaĝo kaj antaŭenpuŝis la vilaĝajn laborojn ke la vilaĝo fariĝis progresinta produkta vilaĝo de la tuta distrikto.

Ŝe Pej-kjun tre atentis pri la propagandaj laboroj. Li ne nur propagandas en sia propra vilaĝo, sed ankaŭ en aliaj lokoj dum postleciona tempo kaj ferioj. Lia prezentado de lumbildoj ankaŭ estas varme bonvenigata de la popolamasoj de la najbaraj vilaĝoj. Ĉiun problemon kiun la popolamasoj ne komprenas, li ĉiam klopodas solvi por ili, kaj edukas ilin per konvinkado. Por plibonigi la malnovan akuŝigan metodon en la vilaĝo, la registaro mobilizis kelkajn virinojn iri lerni en la gubernia urbo. Tamen neniu el ili volis iri. Pro tio Ŝe Pej-kjun klarigis al la popolamaso la bonecon kaj malbonecon de la nova kaj malnova akuŝigaj metodoj kaj li propagandis per lumbildoj faritaj el la koncerna materialo kolektita. Fine 4 virinoj estis mobilizitaj iri lerni en la gubernia urbo.

En la flanko de ĝenerala kulturo kaj edukado por la popolamaso Ŝe Pej-kjun ankaŭ atingis bonan rezulton en siaj laboroj. En junio de 1949 la supera instanco alvokis organizi leglernajn grupojn. Ŝe Pej-kjun unue starigis inter la aktivuloj de la vilaĝo leglernan grupon konsistantan el 3-4 personoj, kiu estis poste partoprenata de 7-8 personoj. Ĉiuvespere Ŝe Pej-kjun instruis en ĝi 2-3 ideografojn kaj tiel daŭrigis ĝin la komenciĝo de la vintra lernado. Kiam la vintra lernado transiĝis en leglernan kurson en la printempo de 1950, Ŝe Pej-kjun organizis viran grupon kaj virinan grupon kaj per tiuj ĉi grupoj kiel fundamento li puŝis antaŭen la lernadon en la tuta vilaĝo. Nun en la vilaĝo estas 62 personoj kiuj partoprenis la konstantan lernadon dum la tuta jaro. En 1950, 43 personoj partoprenis la vintran lernadon. Post la finiĝo de la vintra lernado la lernantoj jam povas legi minimume 100 ideografojn kaj kelkaj eĉ 600-700.

Ĉar Ŝe Pej-kjun fidele laboras dum jaroj por la popola edukado, ne forgesante eĉ dum unu minuto la feliĉan vivon ricevitan dank' al la liberigo gvidata de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung; ĉar li aktive laboradas, persistas en siaj laboroj kaj faris elstaran atingon, li estis elektita kiel speciale eminenta instruisto en la unua honoriga kunveno de eminentaj instruistoj de la elementaj lernejoj en Sungkiang-provinco. Liaj historio kaj spertoj stimulis kaj edukis la kunvenantajn 300 instruistojn kiuj ĉiuj esprimis ke ili lernos de Ŝe Pej-kjun.

J. Plinov

Majtagaj Celebroj

La Unuan de Majo, la ĉinaj laboristoj tra la tuta lando faris grandan demonstracion pri siaj feliĉo, fido, forto kaj decidemo batali por paco. Krom la demonstracio en Pekino, 400,000 labor-popolanoj celebris la Majtagon en demonstracioj en Tienzin, ĉefa haven-urbo en Norda Ĉinio, 500,000 popolanoj paradis en Mukdeno, inkluzive pli ol 300 industriajn laborheroojn, kiuj gvidadis la laboristojn de la regiono al iliaj sukcesaj atingoj en produktado. Grupo da higien-laborantoj kiuj venis al la Nordoriento por batali kontraŭ Usona bakteria milito ricevis grandajn aplaŭdojn.

En Ŝanhajo, Nankino kaj aliaj urboj en Orienta Ĉinio ankaŭ okazis grandiozaj paradoj.

En la Sudokcidento, pli ol 150,000 popolanoj marŝis tra Ĉunking malgraŭ pluvego. La Miaŭ-popolo loĝanta proksime de Kuejjang kaj tibetanoj en la Aŭtonoma Regiono de Sikang-provinco ĉiuj kunvenis por celebri la Majfeston.

En Centra-Suda Ĉinio, centoj da miloj da popolanoj en Vuhan, Kantono, Ĉangŝa kaj aliaj urboj okazigis celebrajn kunvenojn. En Nanning, Kuangsi-provinco, okazis kolorriĉa parado, kun minoritataj grupoj en iliaj naciaj kostumoj.

Junula Tago Celebrita

Ĉina Junula Tago estis celebrata je la 4-a de Majo tra la tuta lando. Je tiu tago antaŭ 33 jaroj ĉinaj studentoj en Pekino okazigis amasan demonstracion kontraŭ imperiista agreso kaj la perfida registaro tiama. Tiu movado tuj ricevis subtenon de laboristoj en Ŝanhajo, Tangŝan kaj Ĉangsintien de Hopej-provinco, kiuj organizis strikon. Tio ĉi markis turnopunkton por la Novdemokratia revolucio en Ĉinio.

Ĉijare en Pekino 300,000 gejunuloj kolektiĝis en parkoj kaj aliaj publikaj placoj por celebri la datrevenon de tiu ĉi historia tago.

En Ŝanhajo, okazis speciala amaskunveno por aklami 28 gejunulojn kiuj montriĝis eminentaj en produktado, studo aŭ laboro.

La junularo en Ŝenjang (Mukden) celebris ĝin per diversaj programoj. En Ĉunking okazis sporta kunveno kun pli ol 10,000 sportistoj inkluzive de tibetanoj kaj ji-popolanoj.

Pli da Loĝejoj por Laboristoj

Loĝado de laboristoj tute neglektita en Ĉinio en la pasinteco,

nun ricevas atenton de la urbaj aŭtoritatoj kaj fabrikaj administracioj.

En Ŝanhajo, konstruado de 21,000 domoj por enloĝigi 100,000 homojn jam estas komencita iniciatite de la municipala registaro kaj la Orient-ĉinia Milita kaj Administra Konsilo. Pli ol 1,000 el tiaj domoj jam finkonstruiĝis laŭprojekte kiuj provizos ĉiajn oportunaĵojn inkluzive de kooperativo, kuracejo, foirejo, elementa lernejo, klubo kaj aliaj necesajoj.



En Pekino, sekvante la konstruadon de 19,675 ĉambroj en la pasinta jaro tuj komenciĝos la konstruado de 15,000 dormoĉambroj. La planoj por tiuj ĉambroj estas elfaritaj en intima interkonsiliĝo kun la laboristoj kiuj loĝos en ili.

En Tienzino, laŭplane konstruiĝos 50,000 ĉambroj dum la kuranta jaro. Ĉirkaŭ 10,000 el tiuj ĉi ĉambroj jam finkonstruiĝis. Modeloj por 10 diversaj tipoj de apartamentoj estas faritaj por plenumi la bezonojn de la laboristoj. Ili estos uzataj en la venontaj konstru-projektoj.

Progreso en Higiena Laboro

Higiena kaj bonstata prizorgo estas ĉiam pligrandigata inter la popolanoj tra tuta Ĉinio. Nun troviĝas almenaŭ unu hospitalo ĉe 85% de la 2068 gubernioj de nia lando. Interne de la gubernioj la nombro de la distriktaj kuracejoj, vilaĝaj sanitariaj stacioj kaj sanoficejoj jam ege plimultiĝis kaj iliaj servoj pliboniĝis. Kooperativaj apotekoj jam fondiĝis grandskale en vilaĝoj kaj iras kun helpo de la registaro.

Dum la pasintaj du jaroj pli ol 200 milionoj da plenaĝuloj kaj infanoj estis vakcinitaj kontraŭ variolo, kaj miliono da infanoj estis inokulitaj kontraŭ tuberkulozo per BCG-serumo. Ankaŭ grandskala imunigo estas farita kontraŭ difterito,

kokluŝo kaj aliaj infanaj malsanoj. Dum la pasintaj 2½ jaroj estiĝis neniu ĥolera kazo tra la tuta lando kaj neniu kazo de variolo en sep el la plej grandaj urboj.

La higiena laboro por virinoj kaj infanoj faris grandan progreson. Nun troviĝas ĉirkaŭ 1,000 institucioj zorgantaj pri bonfarto de virinoj kaj infanoj inkluzive de sanitariaj centroj kaj kuracejoj por virinoj kaj infanoj. Troviĝas ankaŭ 10,000 patrino-stacioj. Pli ol 15,000 akuŝistinoj, patrino-flegistoj kaj obstetrikistoj estas trejnitaj. Pli ol 100,000 malnov-stilaj akuŝistinoj kamparaj estis retrejnitaj en scienca metodo. En Centra-suda Ĉinio sola, ĉijare 20,000 akuŝistinoj estas trejnataj kaj troviĝos unu akuŝistino en preskaŭ ĉiu vilaĝo je la fino de decembro.

Datreveno de la Paroladoj de Prezidanto Maŭ pri Arto kaj Literaturo

La deka datreveno je la 23a de majo de la Paroladoj de Prezidanto Maŭ Ze-tung ĉe la Diskutado pri Literaturo kaj Arto en Jen-an estis honorata tra tuta Ĉinio en la formo de kunvenoj, konferencoj kaj aliaj literaturaj kaj artaj agadoj. Multaj artikoloj aperis en la ĵurnaloj kaj gazetoj, kiuj emfaze elmontris la gravecon de ideologia remuldo de la literaturistoj kaj artistoj por bone servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kion Prezidanto Maŭ priparolis antaŭ dek jaroj.

En Pekino, vespere de la 23a okazis diskutado pri ĉinaj literaturo kaj arto, kiun partoprenis Kuo Mo-jo, Mej Lan-fang kaj 50 aliaj gvidantaj membroj de literatura kaj arta rondoj en Pekino. La kunsido diskutis pri pliintensigo de edukado por elradiki la burĝan influon inter la literaturaj kaj artaj laborantoj kaj konkeri la tendencon de literatura kaj arta formulismo kaj ĝeneralismo, kaj ankaŭ pri levo de arta kaj ideologia nivelo de kreivaj verkoj. Por konkeri formulismon kaj ĝeneralismon, verkistoj nepre devas perfekte koni la vivon de la popolo. Literatura kritiko, estis konsentite, nepre devas esti pli-fortigita.

Raportoj el fremdlandaj ĉefurboj montris ke granda intereso pri la tezo de Prezidanto Maŭ estas montrita de literatura kaj arta rondoj de la Sovetunio, Koreio kaj la popoldemokratioj en Orienta Eŭropo, kiel inter la progresemaj verkistoj kaj artistoj en kapitalistaj landoj.

La Historio de Lo Ven-jing

Ĉang Tien-ji

La lernantoj de la sesa klaso amikiĝis kun iuj el la oĉjoj liberigaj armeanoj kaj korespondadis kun ili. La anoj de la dua pelotono foje sendis al ili leteron, en kiu ili rakontis pri Lo Ven-jing jene:

Oĉjoj:

Je la ricevo de via letero ni ĝojegis.

Vi diris: “Lo Ven-jing progresas kaj aliĝis al la Korpuso de Junaj Pioniroj: vere ĝojiga novaĵo. Tio estas la plej bona donaco, kiun vi sendis al ni.”

Tion leginte, ni estis tiel ĝojaj, ke ni levis Lo Ven-jing en la aeron. Lo Ven-jing kaj ridis kaj larmis pro kortuŝo.

Kiam ni vidis vin lastfoje, oĉjo Liu, la direktoro, demandis Lo Ven-jing kial li ne aliĝas al la junaj pioniroj, kaj la vangoj de Lo Ven-jing flamiĝis pro honto. Li faris peton sed ne estis akceptita, ĉar li studis malbone.

En tiu tempo, Lo Ven-jing havis jam, fakte, la grandan ideon, ke li aliĝos kiel vi al la Popola Liberiga Armeo en la estonteco. La kunlernantoj konsilis al li:

“Ĉu la oĉjoj liberigaj armeanoj ne diris al vi, Lo Ven-jing, ke vi nun devas obei la vortojn de instruisto, bone studi kaj bone ekzerci vian korpon?”

Lo Ven-jing ĵetis rigardon al la kunlernantoj kaj pensis en si:

“Nu, vi vidos—en la estonteco.”

Tio signifis, ke li nepre bone studos kaj bone ekzercos sian korpon. Sed hodiaŭ—jam estas sabato.

Kiam li komencos bone studi, jam venos la libertago. Estus pli bone komenci de la venonta lundo.

Venis la lundo. Lo Ven-jing hejmeniris tre rapide post la lernohoroj posttagmeze. Li decidis ne plu agi kiel en la pasinteco—tiam li iris hejmen nur post 4-5-hora vagado sur la strato. Li manĝis la manĝon rezervitan por li, anticipante la patrinan riproĉon. Hodiaŭ li nepre iros hejmen ĝustatempe, ke li povos bone disponi la tempon post la vespermanĝo. Lo Ven-jing kalkulis dum la irado:

“Mi devas eltrovi la solvon de ĉiuj problemoj aritmetikaj kaj skribi nete en la kajeron. Dimanĉe mi montros al oĉjo liberiga armeano kaj demandos: ‘Oĉjo, ĉu mi povos esti artileriano?’ ‘Povos!’ sendube!”

Lo Ven-jing forte entuziasmiĝis en sia meditado kaj eniris grandpaŝe la bazaron kun rektigita talio—li eniris senkonscie.

Li pasigis pli ol du horojn en la bazaro. Li vizitis multajn butikojn kaj okupis sin je ĉio ajn. Eĉ la porcelanejojn li esploris detale. Li ankaŭ ekzamenis la vicigitajn tranĉiletojn apud iu stando. Li tre deziris iom provi, ĉu tiuj tranĉiletoj estas tiel akraj kiel tiu de Ĉaŭ Kia-lin. Sed tio, kion li studis plej longe, estis la testudidoj en vazo ĉe la pordo de ludilejo.

“Hejmenirinte mi persvados panjon, ke ŝi aĉetu unu por fratineto. Mi ja devas zorgi pri mia fratineto. . . .”

Sed Lo Ven-jing eksentis, ke la tuta bazaro ŝanĝis sian aspekton subite. Li surpriziĝis. Li levis sian rigardon de sur la vazo kaj ekvidis, ke la elektraĵoj lumigis.

“Ho ve, malbenite!” Li tuj rektigis sin kaj foriris. “Mi denove malfruas hodiaŭ!”

Li turnis sin en strateton kaj iris ĉiam pli rapide. Li decidis bone prepari sian lernejan taskon.

“Tiel zorgas pri mi la oĉjoj liberigaj armeanoj. Por akiri la aliĝon al la Junaj Pioniroj mi nepre. . . .”

Subite aŭdiĝis klaka sono tre neta.

“Ho, kiu ludas tablo-kroketon?” Lo Ven-jing ĵetis rigardon en konfitaĵejon. Li ne kontentiĝis je tiu ekrigardo, do li haltis por vidi pli klare.

Aj, nenio alia estis farebla. Lo Ven-jing devis plu rigardi tiun ludon de tablo-kroketo, ĉar jen ‘aeroplano’ staris senmove en la angulo kaj neniel volis moviĝi. La ludanto estis egulo, kiu celis kun peno sed maltrafis. Lo Ven-jing ĝisatendis lian duan vicon, sed li denove malsukcesis.

Lo Ven-jing forte maltrankviliĝis. Ja netolereble! Li devis ankoraŭ rapidi hejmen por vespermanĝi, li havis ankoraŭ 12 aritmetikajn problemojn kaj kaligrafian ekzercon post la manĝo! Tamen la egulo faris kvin



“Ho ve, malbenite!” Li tuj rektigis sin kaj foriris. “Mi denove malfruas hodiaŭ!”

frapojn laŭvice, sed maltrafis ĉiufoje! Kiam venis al li la sesa vico li lasis la 'aeroplanon' je la flanko kaj celis al alia. Lo Ven-jing ne povis ne atendi. Ja ĉiam okazis al li tiaj nesolveblaj malfacilaĵoj.

Tiel, Lo Ven-jing revenis hejmen tre malfrue. Li finis la manĝon haste, timante perdi tempon por prepari siajn lecionojn, ne atendante ĉu tio estas higiena.

"Kien vi iras denove?" panjo demandis kun miro, vidante, ke li kuras eksteren tuj post kiam li formetis la manĝovergetojn.

"Mi iras aĉeti skribkajeron."

"Kio! Ĉu vi ne aĉetis sur la vojo returne de la lernejo?"

"Mi ne havis tempon tiam, panjo."

Tiu lundo pasis same kiel la pasintaj tagoj. Kiam estis tempo por enlitiĝo, Lo Ven-jing ankoraŭ rigardis stulte al la dua problemo de aritmetiko, laca kaj maltrankvila. Nu, estus preferinde prokrasti ĝis morgaŭ matene. Do li iom amuzis sin per la ilustrita gazeto kaj ekzercis sin en kaligrafio kaj ne enlitiĝis antaŭ la dek unua horo. La sekvintan tagon li ellitiĝis malfrue. Tamen li dormis nesufiĉe kaj ĉiam dormetis dum la lernohoroj.

Panjo lin riproĉis: "Vidu, kial vi estas tiel ludema?"

"Ludema?" Lo Ven-jing ruĝiĝis kaj respondis kun elpuŝita buŝo. "Ĉu mi ludis agrable? Mi mem estas malbonhumora."

Estas fakte, ke Lo Ven-jing ne trovis plezuron eĉ en la ludo.

Ni parolis al li:

"Vi ĉiam sopiras esti liberiga armeano en la estonteco, sed vi faras nenian preparadon nun, vivas mallaboreme tagon post tago kaj lasas la tempon elgliti senutile. Ĉu estas konvene?"

"Ĉu mi diris, ke tio estas konvena?" Li klinis sian kapon kaj liaj manoj ludis per la vestangulo. "Sinjoro Ĉoŭ, nia instruisto, diris al mi, ke oni devas ŝpari la tempon kaj bone uzi ĉiun minuton kaj ĉiun sekundon kun preciza kalkulo. Tion mi scias. Sed mi ne scias kiel mi ĉiam refalas en mian eraron senatente."

Ni decidis lin helpi.

"Lo Ven-jing, ni studu kolektive. Ni kvinope iru kune al la hejmo de Li Siaŭ-ĉin por solvi la aritmetikajn problemojn, ĉu vi konsentas?"

"Ni komencu de la venonta semajno?"

"De hodiaŭ."

"Bone, de hodiaŭ se vi tion deziras! Mi aprobas!"

Ĉiuj estis tre ĝojaj. Ankaŭ Lo Ven-jing ne havis plu la malgajan aspekton.

* * *

Post la lernohoroj tiutage ni petis Ĉaŭ Kia-lin akompani lin ĝis lia hejmo. Ĉaŭ Kia-lin memorigis lin ankoraŭfoje ĉe la disiĝo:

"Antaŭ duono post la sesa! Memoru bone!"

"Komprenite, komprenite."

"Lo Ven-jing," Ĉaŭ Kia-lin turnis sin al li post du paŝoj. "Tuj venu post la vespermanĝo, kaj ne iru alien!"

Lo Ven-jing trovis, ke ĉio estas laŭdinda ĉe Ĉaŭ Kia-lin escepte lian nenecesan parolemon.

"Ej, vi ja! Mi garantias, ke mi ne malfruos eĉ unu minuton. Ĉu vi estas kontenta?"

Post vespermanĝo, Lo Ven-jing kolektis siajn librojn kaj skribilaron. Li sciis, ke panjo atentis pri li kaj ĵetis kontentan rigardon al li de tempo al tempo. Sed li ŝajnis, ke li nenion rimarkas. Li ankaŭ ne diris al panjo, ke li partoprenos la studrondon, ĉar li timis, ke ŝi dirus: "Prave. Tiel vi estas bona infano!" Tio farus lin ruĝiĝi.

Li koncentriĝe metis la matematikan ekzerckajeron en la librojn kun klinita kapo. Sed li elprenis denove la kajeron post pripenso. Li decidis ne kunporti la librojn. Kun la librojo sur la dorso li estus miskomprenita de la homoj sur la strato:

"Rigardu, tiu ludema infano hejmeniras denove tiel malfrue!"

Lo Ven-jing elserĉis malnovan ĵurnalon por enpaki la aĵojn. Subite la fratinetino alkuris nudpiede, tenante per ambaŭ manoj ekzempleron de ilustrita gazeto—ĵus alsendita de paĉjo.

"Enpaku frato, enpaku frato!"

Ha, ĝi venis ĝustatempe! Kvazaŭ paĉjo scias, ke li iros partopreni la studrondon hodiaŭ! Li povas porti tiun ĉi freŝdatan numeron de ilustrita gazeto al la domo de Li Siaŭ-ĉin kaj li rigardos ĝin kune kun la kamaradoj dum la ripozo. Poste li restigos la gazeton en la studrondo kiel komunan posedadon.

"Ho, bona infano!" Lo Ven-jing transprenis la gazeton el la fratinetinoj. Post ekrigardo al la kovrilo, li malpakis la pakadon kaj volis ĝin enpaki. Li rigardis la kovrilon ankoraŭfoje.

"Kiu estas tiu ĉi?" li demandis sin mem. "Produkta modelo?"

Li volis ĝin enpaki, sed li ne povis lasi la problemon nesolvita: Ej, kiu li tamen estas?—Tiu oĉjon sur la kovrilo, mi kvazaŭ vidis ie.

La sola rimedo por solvi la problemon estis malfermi la gazeton kaj serĉi en la tabelo de enhavo. Kiam li malfermis ĝin, li jam ne povis deteni sin de trafolio de la komenco ĝis la fino por ekscii la ĝeneralan enhavon.

"Simple foliumi iomete ja ne gravas." Li rigardis tiun kaj ĉi tiun bildon. "Kio estas tio?"

Por plene kompreni li devis tralegi la sube aldonitan klarigon.

Lo Ven-jing legis vorton post vorto kaj komparis ĝin kun la bildo kvazaŭ por kontroli, ĉu la klarigo estas preciza. Li ankaŭ legis kelkajn paragrafojn el la artikoletoj dum foliumado. Dume li tamen urĝis sin:

"Sufiĉe, sufiĉe, iru tuj! . . . Jen oĉjo kamparano! Ho, tre brave!"

La tempo ne atendis. Lo Ven-jing ĵetis rigardon al la horloĝo kaj salte ekstaris forĵetinte la ilustritan gazeton.

"Ĉu nia horloĝo tro rapidas, panjo?"

"Ne, mi ĵus ĝustigis ĝin hodiaŭ per telefono."

Tute fuŝite! Lo Ven-jing ekprenis la paperpakadon subbrake kaj volis diri ĝisrevidon al sia panjo kaj tuj foriri. Sed li trovis tion ne oportuna.

"Lo Ven-jing, kial vi malfruas?" La kamaradoj certe demandas.

"Lo Ven-jing, kial reaperas via malnova kurtimaĉo?" Demandos certe la kamaradoj.



“Ne libera? Do kial vi rigardas la ilustritan gazeton?” Li Siaŭ-ĉin devigis lin leviĝi per tiro.

Li stultiĝis rigardante al sia paperpakaĵo kaj ne sciis kion fari.

Li hontis iri al la hejmo de Li Siaŭ-ĉin. Li larmis pro embaraso.

“Iru, iru! Ne gravas, se vi pliboniĝos estonte.” Li aŭdis iun voĉon lin vokanta.

Sed kiu sciis, kiel traktos lin la kamaradoj? Ĉu ili akceptos lin, kiam li iros? Li rompis sian promeson! Li eldiris ĝin proprabuŝe sed ne observis! La kamaradoj certe raportos al Sinjoro Ĉoŭ, la instruisto, kaj al la oĉjoj liberigaj armeanoj. Ve, li tro multe kulpas kontraŭ la oĉjoj liberigaj armeanoj!

“Oĉjo Liu, ĉu vi ankoraŭ amikiĝos kun mi?”

Du larmoj fluis malsupren laŭ la vangoj.

Se nun estus antaŭ duono post la sesa Sed la tempo ne revenos plu! Kaj la perdita tempo ne estas revokebla!

Li volus kulpigi sin antaŭ la kamaradoj kaj ricevi ilian kritikon, se ili konservus la amikan rilaton kun li, permesus lin aliĝi al ilia grupeto kaj helpus lin en la studo. Estonte li ne malfruos.

Ju pli malfrua la tempo fariĝis, des pli li pentis kaj ankaŭ pli multe koleris kontraŭ si. . .

Li ekstaris je surprizo: li aŭdis, ke iu vokas lian nomon.

Li streĉis sian aŭdon por aŭskulti atente, sed aŭdis nur, ke la fratineto kantas senorde “La museto grimpas sur la olelampon” kaj panjo memorigas la vortojn al ŝi de tempo al tempo.

“Kiu ja vizitus min en tiu momento?”

Lo Ven-jing, vi eraras. Kiel la kamaradoj pioniroj povos forlasi vin ignorante? Aŭskultu! Ĉu ne iu vokas?

Efektive iu vokis lin. Li povis rekoni, ke unu el la voĉoj apartenas al Ĉaŭ Kia-lin. Inter ili distingiĝis voĉo soprana. Jen ilia grupetestro, Li Siaŭ-ĉin. Ankaŭ ŝi venis por lin voki. Ne plu necesas heziti. Kompre-

neble li alrapidis por ilin renkonti kun laŭta respondo: “Mi venas, mi venas!” kaj iros kune kun ili por prepari la lecionojn. . .

Sed Lo Ven-jing ne tion faris. La situacio estis tro ĝena. Kiam enkuris Li Siaŭ-ĉin kaj Ĉaŭ Kia-lin, Lo Ven-jing ege volus forkaŝi sin. Li klinis sian kapon.

“Lo Ven-jing,” alkuris Li Siaŭ-ĉin transpasinte la sojlon. “Kial vi ne iras studi kune kun ni?”

Lo Ven-jing sentis kaj ĝojon kaj doloron, fortunis sian vizaĝon por ne rigardi ilin.

“Kiel?” Li Siaŭ-ĉin hezitis momenton ĉe la sojlo kaj alproksimiĝis malrapide kun mallaŭtaj paŝoj. “Ĉu vi estas malsana?”

“Ne.”

“Do ni iru,” Ĉaŭ Kia-lin metis ambaŭ siajn manojn sur la ŝultrojn de Lo Ven-jing kaj interŝanĝis rigardon kun Li Siaŭ-ĉin.

Lo Ven-jing forte mordis sian malsupran lipon timante, ke li ekplorus pretervole, kaj parolis kun peno nur post longa silento, lia voĉo estis apenaŭ aŭdebla.

“Mi ne iros mi ne estas libera”

“Ne libera? Do kial vi rigardas la ilustritan gazeton?” Li Siaŭ-ĉin devigis lin leviĝi per tiro. “Iru, ĉiuj atendas vin.”

La kamaradoj atendas lin!—Li Siaŭ-ĉin neniam mensogis.

Cetere Ĉaŭ Kia-lin aldonis:

“Se ni ne trovus vin hejme, ni serĉus vin en la bazaro. Se tie vi ankaŭ ne troviĝus, ni serĉus tra la stratoj, ĉe la polica oficejo. Ni nepre elserĉu vin, por ke vi venu studi lecionon kune kun ni: jen la decido de la grupeto.”

Do rapidu! Ne prokrastu eĉ unu sekundon!

La kamaradoj sciigis panjon pri ĉio ĉi, kiu tiel ĝojis, ke ŝi kaptis la manon de Li Siaŭ-ĉin:

“Tiel estos tre bone. . . .”

La vangoj de Lo Ven-jing ekbrulis kaj ekkuris tirante Li Siaŭ-ĉin. Li apenaŭ eliris la pordegon, reeniris fluge, ekkaptis la ilustritan gazeton sur la tablo kaj kuris eksteren saltante.

La tri kamaradoj foriris ridante kaj kriante.

La rezultato de tiu tago estis tre kontentiga. Ili amuzis sin longe post la preparado de la lecionoj. Lo Ven-jing neniam spertis tiom da ĝojo.

“Eja, de nun mi devas atenti,” decidis Lo Ven-jing. “Ne plu pasigu la tempon sensece.”

Li ĉiam memoris la parolon en la letero de la oĉjo liberiga armeano: “Mi esperas, ke vi povos vin bone regi.”

Li proponis al Li Siaŭ-ĉin:

“Estonte, ne sendu iun por akompani min post la lernohoroj, ĉar vi ĉirkaŭirus tre malproksime kaj perdus multe da tempo. Ĉu ne estas sufiĉe, ke mi bone regu min mem?”

“Bone,” Li Siaŭ-ĉin respondis post ioma konsidero. “La grupeto kredas, ke vi plenumos vian promeson.”

Lo Ven-jing efektive agis kiel li promesis. Kaj lia studo progresadis ĉiutage.

“Estis vere malfacile ĉe la komenco,” Lo Ven-jing rememoris la tiaman staton. “Dum la unuaj du tagoj estis tolereble bone. La grupeto sendis nenium por min akompani. Mi hejmeniris unuope trankvile. Sed iomete alia estis la tria tago”

Vento blovis la trian tagon. Forlasinte la lernejon li pasis preter la enirejo de la bazaro. Li tre zorgis pri la testudidoj en la vazo. Hodiaŭ estas tiel malvarme. Kiel ili statas? Ĉu ili ankoraŭ naĝas tiel vigle?

“Jes ja, ĉu la rampuloj ne malvarmumas?” li demandis sin. “Iru rigardeti, ej? Malpermesite!”

Post kelkaj paŝoj. Kvazaŭ io jukis en lia koro. Rigardeti nur la testudidojn kaj nenion alian, ĉu permesite? Tio ja estas ekskuzebla?

He, ne iru tiel rapide! Bone konsideru!

“Neeble!” Lo Ven-jing regis sin perforte.

Dume ĉe la konfitajisto sur la strateto neniu ludis tablo-kroketon, sed tri homoj sidis tie ludante saltŝakon. Lo Ven-jing konis je ekrigardo. Sed li ne sciis ĉu ili ludas bone kaj kiu estas la venkanto.

Kiel? Rigardi iomete—nur iomete, ĉu permesite?

“Iomete? Hm, same malpermesite!”

Li ĝemspiris pro ĉagreno. Vi devas kompreni, ke saltŝako ne estas tia, kia tablo-kroketo. Hodiaŭ mi nur rigardos iomete kaj ne rigardos plu de morgaŭ. Tio ja estas permesebla?

Li ekmemoris pri Oĉjo Liu kaj la aliaj. Se la oĉjoj konus, kion li nun pripensas, kion ili dirus?

“Hm, la malnova kutimaĉo!”

Lo Ven-jing paŝis decideme sen malantaŭen-rigardo.

Poste multe pliboniĝis. Unu tagon, ekzemple, li rimarkis jujubon sur la tero. Li studis la aferon nur dum minuto. “Nu, ĉu ĝin perdis vendanto aŭ la manĝanto?” Li forpuŝis ĝin piedfrape tiel malproksimen, ke ĝi tuj malaperis.

“Kien ĝi estas puŝita?” Jam lasu! Li estas okupata. Laŭ lia antaŭa kutimo, li nepre elserĉus ĝin.

Sed la jujubo mem retroruliĝis saltante, ĉar iu infano ĉe la kontraŭa flanko ankaŭ puŝis ĝin per piedfrapo. Lo Ven-jing tuj repuŝis ĝin piede. La alia infano lerte haltigis ĝin per piedo kaj ĝojege invitis lin kun mangesto:

“Jen mi gardas la golejon kaj vi puŝu.”

Lo Ven-jing hezitis nur du sekundojn.

“Mi ne estas libera: nun ne estas tempo por ludo.” Lo Ven-jing foriris mangestante. “Amiketo, ankaŭ vi tuj hejmeniru!”

Ĉion tion Lo Ven-jing raportis al Sinjoro Ĉoŭ, la instruisto, kaj la studrondo.

Oĉjoj, Lo Ven-jing tiel preparas sin por lerni je viaj ekzemploj. Lo Ven-jing tiel progresas iom post iom.

Nun, Lo Ven-jing jam formis al si novan bonan kutimon. Li tuj forturniĝus, se vi invitus lin al ludo kiam ne estas tempo por ludi. Li lernas, laboras, sportas kaj ripozas en fiksitaj tempoj, kaj ne plu malŝparas tempon. Hejme li ankaŭ havas tempon por helpi sian panjon kaj prizorgi sian fratineton. Li mem diris:

“Antaŭe, ne sciante ŝpari tempon, mi ĉiam trovis ĝin malsufiĉa por ĉion zorgi. Fratineton mi amas. Ŝi ne ploras, eĉ se ŝi falas, nur kriante: ‘Fraĉjo, min prenu de la tero!’ Mi ne komprenas dumlonge. Foje ŝi diris: ‘Kion fare! Mia olelo malvarmumas.’ Divenu, kion ŝi volis diri? Kaj nazmukon ŝi nomas ‘nazonazo’”

“Lo Ven-jing,” interrompis lin Sinjoro Ĉoŭ. “La gramatikon kaj elparolon de via fratineton ni diskutos poste. Dum nia parolado kaj verkado ni ankaŭ devas atenti pri ekonomio. Havu centron en via parolado, kaj ne babilu laŭ kaprico tion kaj ĉi tion senrilate.”

Do ankaŭ nia babilado finiĝu ĉi tie estante.

Saluton!

(Subskribo)

Tradukis S. J.



“Mi ne estas libera: nun ne estas tempo por ludo,” Lo Ven-jing foriris mangestante.

Bonvolu Akcepti la Honoron Kiun Ni Alportas al Vi

Por gratuli la ĉinajn fratojn pro ilia triumfo en la armila kontribuado

Hong Sun-ĉel

(La gvidanto de la Korea Popola Delegacio Vizitanta Ĉinion)

Birdoj intence laŭte kantas
Al la printempa ĉielbluo,
Saturas la aeron varman akra bruo;
Komencas la herbĝerموj sin disvolvi,
Murmuras laŭplezure font' kantanta:
Jen ankaŭ ili ĝojas pro 1' triumf' giganta!

Je la hurlado de kvincent milionoj,
Kvazaŭ je eksplodo de vulkanoj,
Tremas la vasta tero,
Maltrankviliĝas kaj la oceanoj.

Dum mi memoras pri la firmamento de la batalanta
Koreio,
Ŝajnas jam, ke helice' turniĝas en la koro.
Sed nun mi vidus kvazaŭ:
Vicigas kvincent milionoj milojn da aeroplanoj pretaj
je la aviado
Kun kapoj kontraŭ 1' malamiko.
Ĝojkrii volas mi pro la giganta triumfo de 1' kon-
tribuado
Kaj mi saluti volas al la granda ĉinpopolo!

Leviĝas nun neestingebla flamo
Kaj la pulsado batas ĉiam febre,
La koroj kiuj nin helpadas kiel eble
Estas sennombraj koroj kun ardega amo.

Mi vidas kaj mi aŭdas klare:
Ĉiu vilaĝo, ĉiu strato, ĉiu homo,
La kampoj vastaj, la arbaroj densaj kaj riveroj kiuj
fluas orienten:
Ĉio nin helpas malavare.

Subten' sincera kaj potenca
Kaŝiĝas ja en la movado helpi Koreion kontraŭ Usono
Kaj la hurlado de 1' amikoj justaj
Skuos la fundamenton de la Blanka Domo.

Subteno kaj kuraĝig' senĉesaj de 1' kvincent milionoj
Plie firmigas nian batalvolon
Kaj fidon je la fina venko nian.
Por ĉio, kion mi vidas kaj aŭdas
Krom la dankemo mi povas esprimi nenion alian.

El la nubskrapaj kamentuboj treniĝadas fumoj de la
pliprodukto,

Kaj la grenkampoj vastaj flavas kun abunda jara
frukto.

Sur la produkta fronto dum tagnokta laborado
Vi ne forgesas eĉ momente Koreion,
Kvankam vi ne batalas kun pafilo en la mano
Sed ni staradas ĉiam ŝultron eĉ la ŝultro en la kuna
lukto.

Sango kaj ŝvito kune kun la batalvolo ŝtala
Postlasas belan epopeon
Venkinte ĉian provon malfacilan kaj amaran.

Miaj eternaj fratoj!
Karaj patrinoj kaj fratinoj!
Mi bedaŭras, ke mi ne povas manpremi kun ĉiu el la
kvincent milionoj.
Mi bedaŭras ke mi ne povas forte, forte premi
La manon de ĉiuj indignaj ĉinoj.

Bonvolu akcepti 1' honoron,
Kiun nia tuta popolo portas al vi.
Bonvolu akcepti 1' honoron,
Kiun portas al vi niaj fratoj kaj fratinoj
Ricevintaj la' nomon de Matrosof aŭ Tanja,
—La respekton kaj honoron de venkantaj herooj kaj
heroinoj!
Karaj batakamaradoj,
Kies nomoj brilos ĉiam en la milmiljara historio!
Ni ne plu volas havi
La malhonoran historion, de kiu ne troviĝas eĉ fosilio.
Ni manpremu forte kaj pli forte,
Elluktu kun kuraĝo venkon nian,
Kies lum' prilumu la tutmondon ĉiam!

Sub via fervora subteno
Ni ekstermos la senkorajn Usonajn brutojn ĝis la lasta,
Kiu okulojn elpikas de homoj kaj mamojn detranĉas
de homoj,
Kaj forlavos de sur la terglobo la Usonajn mortigistojn,
Kiu disĵetas bakteriojn kaj batalas kontraŭ tuta la
homaro vasta!
Per varma larm' mi skribas tiun ĉi poemon dankespri-
man por gratuli la triumfon en la kontribuado.
Kaj dume,
Mi abomenas la malamikojn mordpremanie miajn lipojn
Kiu eksangas preskaŭ eĉ 1' mordado.

El ĉinlingva traduko S. J.

800 Studentoj de Nagoja Universitato Batalas kontraŭ Reakcia Leĝo

Karaj kamaradoj,

Okaze de nia kunveno por frakasi la abomenegan leĝon malbonan, nome Leĝo kontraŭ Rompo-ago, ni sendas nian mesaĝon en la nomo de ĉiuj ĉeestantaj 800 studentoj de Universitato Nagoya. Hodiaŭ ni aŭdis la emocioplenajn paroladojn de Profesoro E. Sinmura (esperantisto), Profesoro H. Egami (esperantisto) kaj advokato S. Amano pri tiu ĉi leĝo. Sed por ni estas jam tute klare ke tiu ĉi leĝo ne povas esti pensata kiel la leĝo senrilata al la jam kontraktita packontrakto en San-Francisko. Tio estas ja unu el la logikaj konkludoj de 1' t.n. "Repaciĝo de Kompromiso kaj Konfido." Tia senhonta leĝo nur celas ke ni fariĝu la dungitaj soldatoj por kontentigi la intencojn de Usona imperiismo.

Ni pensas, estas ja tre ironie ke hodiaŭ estas la tago de 1' falsa sendependiĝo, la trompa packontrakto. Anstataŭ gratuli tiun ĉi efektivigon, ni forte alvokas ke ni neniel akceptos tian packontrakton kaj aliajn malbonajn leĝojn, kaj nepere batalados por frakasi ilin.

Karaj kamaradoj de Ĉina Ligo de Studentaro! Nepre ni sekvos vin kiuj jam delonge de 1' 4a-Majo bataladis kontraŭ alilandaj imperiistoj kaj nun konstruas la novan Ĉinion.

Estimataj kamaradoj de "El Popola Ĉinio!" Elkoran dankon por viaj grandegaj laboroj por Paco, kiuj eterne brilos en estonta historio de 1' pacmovado!

La tuta popolo kaj junularo de Ĉinio! Ni tute ne prenos la armilojn kontraŭ niaj amikoj de nova Ĉinio, kiuj heroe bataladas sinoferante por mondopaco. Ni estas porĉiamaj amikoj de la ĉina popolo.

Karaj laboristoj de Ĉinio! Esperplena estas nia batalado. Venko nepre lumiĝos sur ni. Ni luktu kaj manifestaci por Mondopaco en la venonta Maja Tago.

Sub la leviĝantaj ondoj de 1' tutmonda pac-fortoj, ni neniel perfi-

dos kaj vi povos konvinki ke ni sukcese plenumos nian sanktan devon.

Gloru nian amikecon!

Vivu pacmovado!

Pacbatalante salutas

Studenta Kunveno de
Universitato Nagoya
por Frakasi la Malbonan Leĝon.

La Usonaj Imperiistoj Superas Hitler-on

Karaj gekamaradoj!

En Svedio la batalo inter la reakciuloj kaj la progresemaj fortoj konsiderinde pliakriĝis. Kiel ĉiam kaj ĉie oni unue provas ataki la komunistan partion. Se la nura kalumniado kaj mensogado ne sufiĉas, oni provas uzi provokantojn, kiuj provas fari kontakton kun



komunistoj kaj poste vaste kriadas, ke ili ricevis la taskon spioni por Sovet-Unio. Oni jam faris du provojn, sed kompreneble nur naivuloj lasas sin trompi. La vivnivelo jam sufiĉe malaltiĝis, la prezoj konstante altiĝas, sed la salajroj nur malmulte kaj nur post akraj bataloj. Plej teruraj estas la impostoj; oni unue pagas rekte de la salajro kaj poste denove ĉe la jarfino! Se persono krom tio ne estas tute sana, la stato efektive estas malfacila. Por malhelpi al la popolo mediti pri tiaj aferoj oni intensigas la stultigan propagandon pere de radio kaj gazetaro. La provokantoj, kiujn dungas la polico, ja donas la saman servon. Sendube oni ricevis ordonon pri tio el "Paradizo de la Libereco kaj Demokratio".

Mi jus legis pri la abomena agado de Usonaj imperiistoj en Koreio. Ili jam sendube konsiderinde superas Hitler-on. Sed ĉu la fondintoj de

Alvoko al Esperantistoj de la Tuta Mondo

Atento de ĉiuj popoloj estas nun direktata al la plej grava problemo—konservo de la paco. Nia generacio, kiu travivis du mondmilitojn scias, kion signifas ripeto de la krimigo de nova milito, alportonta pereon al la homaro.

En profunda maltrankvilo ni observas preparojn de la imperiistaj ŝtatoj al nova militbuĉado. Nerenkontita en la historio de la homaro vetkurado de sinarmigoj subfosas ekzistadopovon de multaj popoloj kaj kaŭzas plimalaltigon de vivnivelo.

Por krucigi la imperiistajn planojn, sub la standardoj de la pactendaro ariĝas nun ĉiuj homoj de bona volo sen diferenco de nacieco, raso, religio kaj politika aparteno. Ilin kunigas la komuna aspirado—malebligo de nova agresa mondmilito.

La esperanta movado naskiĝis el la spirito de paco kaj estas plue per paco saturita. Ĉiu esperantisto estas laŭnature pacdefendanto.

Ni alvokas esperantistojn de la tuta mondo al aktiva enviciĝo de la pacbatalantoj!

Postulu subskribon de la pactraktato inter la kvin mondŝtatoj!

Protestu kontraŭ rearmigo de la okcidenta Germanujo!

Postulu malpermeson de la atomarmilo!

Postulu la ĝeneralan senarmigon!

Postulu la tujan ĉesigon de la bataloj en Koreio!

La paco venkos la militon!!

Asocio de Esperantistoj
en Pollando

Usono iam povus imagi al si, ke iliaj heredantoj estonte uzos pulojn kaj pedikojn por savi sian "civilization"? Kaj la nunaj regantoj de Usono eĉ ne tiom da honesto havas en sia korpo, ke ili anstataŭigas la stelojn en sia flago per pedikoj!

Nun mi finas, dezirante al Vi ankoraŭ pli grandan sukceson ĉiurilate!

Kore salutas Via

Gustav Nilsson

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata
de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo—Majtagaj
Demonstraciaj Kolonoj Pre-
terpasas Tien-an-pordegon.*

Protektu la Infanojn

**Disvolvigu Internacian Komercon
Majtaga Parado de Fido kaj
Forto**

Ĉiam Pli Feliĉa

**Avicenna, da Vinci, Hugo kaj
Gogol Rememortaj**

Atesto de Bakteria Milito

Ĝojo de Heroo

Venko super Sekegeco

**Eminentaj Vilaĝaj Instruistoj ŝe
Pej-kjun**

La Historio de Lo Ven-jing

**Bonvolu Akcepti la Honoron
Kiun Ni Alportas al Vi**

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

Aŭstralio: Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park,
N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

Aŭstrio: Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12.
(Jarabono 20 schilling-oj)

Belgio: Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo.
(Poŝtĉekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

Britlando: (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's
Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
(2) **Universala Esperanto-Asocio**, Heronsgate, Rick-
mansworth, (Herts.).

Bulgario: (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI
UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)
(2) Ivan Kovaĉev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

Ĉeĥoslovakio: Burda Rudolf, Plzen, palackeho N. ĉ. 6,
(Jarabono 50 kĉs.)

Danlando: Borge Astrup, Ymersvej 32, Randers.
(Jarabono 6 kronoj)

Finnlando: Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9.
(Jarabono: 300 Fmk.)

Francio: Labor-Esperantista Federacio, sekretariejo: 4 str. Gen.
Malletterre, PARIS 16. CCP 902-52 (Jarabono: Fr. F. 450)

Germanio: (1) Helmut Löffler, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1.
(Jarabono: 6 D.M.)
(2) Heiny Knorr, (24) Hamburg-Wellingsbüttel,
Ekerkamp 81.

Hungario: (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10.
(Jarabono 15 forintoj)
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest, XII,
(poŝtkonto 38.187)

Islando: Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik.
(Jarabono 15 kronoj)

Italio: Eduardo Zumbo, Casella postale 226, Torino.
(Jarabono: 400 liroj)

Izraelio: Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

Japanio: (jarabono 360 jen-oj)

Nederlando: (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223,
Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

Pollando: Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszal-
kowska 81/32. (Poŝtĉeka konto I—4329/113)
(Jarabono 12 zl.)

Rumanio: Rumana Esperantista Societo. București I, Bulev. 6
Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

Svedio: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.
(Jarabono 5 kronoj)

Usono: (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj
(1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj).
Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.